

Antologio XXXIV

Claude Piron

Psikologo, psikanalisto kaj psikoterapiisto

Kien esperanto ? (1994)

Prelego en Cully

Enkonduko:

En 1980 estis lanĉita, okaze de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Raŭmo (Finnlando), la Manifesto de Raŭmo, kiu liveris la fonton de la t.n. 'raŭmismo', kiu estis diskutata precipe en rondoj ĉirkaŭ Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop) kiel alternativo al la t.n. 'pracelismo' aŭ 'finvenkismo'. La tekston de la ĝis nun kontestata manifesto aŭtoris ĉefe Jouko Lindstedt (Finnlando) kaj Giorgio Silfer (Italio/Svislando), sed ankaŭ Amri Wandel (Israelo) kontribuis al la diskuto en la dumkongresa seminario, sur kies prelegoj la manifesto baziĝas. En tiu strategia dokumento la junaj Eo-intelektuloj konstatis i.a. senton de krizo de identeco, kritikante la pracelojn (la koncepton de la 'fina venko'), kaj esprimis la deziron motivi sian e-istecon per io pli kohera. Postulata estis la kreo de novtipa internacia kulturo unuavice ne *por*, sed *per* Eo. Laŭ la 'raŭmismo' Eo havas valoron por si mem, sen ke necesas atendi la venontan internaciigon oficialan de la lingvo. Do raŭmismo favoras specon de identiĝo kun la kerno de la komunaj valoroj de ĉiuj e-istoj, kiuj volas ilin vivosperti, senkonsidere de tio ĉu la praceloj ne estas atingitaj.

Inter tiuj e-istoj, kiuj kritike reagis al la Manifesto de Raŭmo, troviĝis la svislandano Claude Piron (*1931), kiu estas profesia psikologo, psikanalisto kaj psikoterapiisto, konata verkinto de multaj artikoloj pri la utileco de Eo, aŭtoro de la franclingva libro *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens* (L'Harmattan Paris 1994) kaj de popularaj Eo-krimromanoj. Principe Piron ne rifuzis la manifeston en si mem, sed forte malkonsentis pri kelkaj el ĝiaj ĉefaj tezoj.

Ĉe la teksto de prelego de Claude Piron, kiu estis kasede prezentita okaze de Eo-kunveno en Cully, Svislando, en septembro 1994, temas ne nur pri trafa respondo al la Manifesto de Raŭmo. Ĝi estas samtempe arda – kaj tre persona – manifesto de konvinkita e-isto, kiu skeptikas pri la neceso kritiki la pracelojn de la e-ismo kaj artefarite disdividi la Eo-movadon inter „ni“ kaj „ili“.

Kiel homo, kiu praktike spertis la absurdan lingvokomunan problemon en grava internacia organizaĵo sine de la burokrata sistemo de UN, Piron estas konvinkita, ke Eo povus havi ne nur kuracan valoron por la internacia lingvoproblemo, kiu tiom suferigas la homaron, sed ke ĝi povus fari ankaŭ efikan kontribuon al la starigo de justa Nova Monda Komunik-Ordo, kiun la homaro tiom draste bezonus. Se ekzistas do iuj e-istoj, kiuj pensas ke ili suferas je „esperantozo“, Piron konsilas konsideri tiun „malsanon“ kiel tute normalan „neŭrozon“, eĉ necesan kaj indan ĉe e-istoj, kiuj enamiĝis al Eo. Piron kredas ankaŭ, ke Eo povus servi kiel ilo por kontribui al la „elimino de multaj suferoj aŭ kulture danĝeraj situacioj“.

Per sia same originala kiel provoka prelego Piron daŭrigas la diskuton pri la demando kial la malpli eliteca 'finvenkismo' verŝajne pli bonvenas kiel strategio de la Eo-movado por ke Eo estu konsiderata, komence de la 21a jarcento, kaj kiel taŭga alternativo al la lingva ĥaoso en Eŭropo kaj eble ankaŭ en la tuta mondo. (vd. ankaŭ la partojn XXXV kaj XXXVIII de ĉi tiu Antologio).

Originala teksto (en Esperanto):

Kien esperanto?

La temo estas vasta. Sed mia kontribuo limiĝos je la Raŭma Manifesto. Kial? Ĉar, kiel vi vidos el mia konkludo, ĝi situas en centra loko en la historio de esperantismo. Cetere, la esprimo „Kien esperanto?“ estas dubsenca: ĉu ĝi signifas „kien ĝi iras?“ aŭ „kien ĝi iru?“. Feliĉe, laŭ mia konceptado, ne estas problemoj, ĉar ĝi iras, kien ĝi iru, nome: al la fina venko. Pri tiu fina venko mi poste reparolos. Verŝajne multaj el vi estas skeptikaj, kaj kelkaj eble jam ridetas ironie. Ne gravas. Mi ĉiam konservis ian infanan naivecon, kiu alportis al mi tiom da ĝojo en la vivo, ke ne havus sencon rezigni ĝin favore al pseŭdo-realisma pesimismo, kiu ne disradias feliĉon ĉirkaŭ si. Sed pri tio pli poste. Nun mi klarigos al vi, kiel mi reagis al la Manifesto de Raŭmo.

Tendenco apartigi

Unu el ĝiaj trajtoj estas la volo de apartigo, kiu esprimiĝas en ĝi. Ĝi dividas la esperantistojn en du grupojn: estas *ili*, kaj estas *ni*. Subkomprenite: *ili* estas malpravaj, *ni* estas pravaj; *ili* estas fuŝuloj, homoj kun idealismaj, nerealismaj celoj, *ni* diskrevigis la mitojn kaj objektive vidas; *ili* elektis neĝustan vojon, la ĝustan vojon elektis *ni*.

Tiu disdivido ŝajnas al mi neĝusta. Ĝi metas rigidajn limojn en realo diversa, moviĝanta, fleksebla, kiun tia simplismo ne povas kapti.

La analizo de la prceloj, en punktoj 1 kaj 2 de la Manifesto, ne respondas al mia sperto. Eble, simple, la frakcio de la esperantistaro, kun kiu mi rilatas, estas sufiĉe ne-tipa pri la ĝenerala esperantistaro. Sed ĉu la aŭtoroj de la Manifesto bazis sin sur specimeno pli reprezenta? Nenio ebligas tion kredi. Fakte, mi suspektas la psikan meĥanisman, kiun oni nomas projekcio. Tuj kiam oni dividis komunumon en du partojn, *ili* kaj *ni*, tiuj „ili“ alprenas simplisme skizitajn fi-karakterizojn, kiuj apartenas pli al la imago ol al la realo. Ekzemple, mi neniam renkontis esperantiston, kiu favoris „faligon de la angla“, kiel diras la Manifesto, aŭ kiu kredis je ebla oficialigo de esperanto en la 80-aj, eĉ en la 90-aj jaroj. Tia priskribo estas karikaturo koncerne la parton de la esperantistaro, pri kiu mi havas sperton.

Pri la punkto 3, mi sentas hodiaŭ la saman rezervon, kiel mi sentis unualege. Mi ne konceptas mian esperantistecon „kvazaŭ la aparteno al mem elektita diaspora lingva minoritato“. Mi konservas tiun identecon, eĉ se la plimulto el la homoj praktikus esperanton. Estas fakto, ke, estante esperantisto, mi nun apartenas al malplimulto, sed tio tute ne estas esenca. Ankaŭ ĉi tie mi perceptas ĉe la aŭtoroj emon dividi, apartigi; ĉifoje ne plu divido inter esperantistoj, sed divido en la homaro: plimulto ne interesiĝanta pri esperanto unuflanke, kiu estas „*ili*“, kaj, aliflanke, minoritato kun aliaj celoj kaj interesoj, kiu estas „*ni*“. Danĝero de tia divido estas, ke oni riskas senti sin apartigitaj pro supereco, kaj tion mi malfidas.

Fakte, estas interese, ke la apartigemo, kiu laŭ mi karakterizas la Manifeston, troviĝas sur tri niveloj: en la homaro, kiel mi ĵus diris, en la esperantistaro, kiel mi montris komence, kaj en la individua esperantisto mem, kio aperas en la unua punkto, titolita *Krizo de identeco*.

Tie la aŭtoroj notas ĉe esperantistoj dividon inter superegoo predikema kaj mitama, kaj egoo, pro kiu, laŭ ili, ni simple ĝuas esperanton inter ni. Simila priskribo tute ne esprimas la realon, kia mi perceptas ĝin. La superegoo ja estas la parto de ni, kiu agas kiel aŭtoritato. Mi forte dubas, ke esperantistoj, kiuj propagandemas, faras tion pro sento pri morala devo. Mi opinias, ke tiu konduto radikas en la egoo, same kiel la plezuro troviĝi inter ni kaj ĝui la lingvon. Ĝuste ĉar ni trovas esperanton io mirinda, mirakla, riĉiga por la animo kaj la koro, io, kio por multaj el ni ŝanĝis la vivon en ege pozitiva senco, ĝuste pro tio ŝprucas en ni intensa deziro diskonigi ĝin, kiel trezoron. La plimulto el la esperantistoj, miaopinie, emas disvastigi ĝin, agnoskigi ĝin, oficialigi ĝin simple kiel enamiĝinto inklinas rakonti al ĉiuj pri sia amo, pri la mirinda persono, kiun li renkontis kaj amas. Tio absolute ne radikas en superegoo, kiu aŭtoritate diktas devojn kaj kiu, se oni ne sekvas ĝiajn ordonojn, kreas kulposentojn. Male, estas tipa konduto de homo kun sento, kiu bezonas disradii, ĉar pretersilenti la mirindecon de la renkontita trezoro estus simple neeble. Ĉi tiu priskribo validas por la granda plimulto el la propagandemuloj, kiujn mi renkontis aŭ kun kiuj mi kunlaboras. Sekve, tute ne estas konflikto inter superegoo kaj egoo, sed ĝenerale personeco kun fortaj sentoj, kiuj ne povas ne manifestiĝi ekstere, ne povas ne strebi al entuziasmigo de kiel eble plej multaj aliaj homoj.

Ke tio igas nin transpasi la limojn de objektiveco ĉe intervjuo, ekzemple, tio radikas simple en la forto de la amo. Homo, kiu amegas, emas laŭdegi la amatan personon, kaj troigi ties belecon. Se tiakaze rolos superegoo, ĝi tute ne instigus al troa laŭdego, ĝi devigus la koncernaton objektivi, kaj la troiginto poste sentus sin premata de kulposento pro sia trompo, kio simple ne okazas ĉe niaj propagandemuloj.

La divido inter superegoo kaj egoo do ŝajnas al mi neĝusta, plia konkretigo de ia, verŝajne nekonscia, bezono partigi kaj apartigi. Cetere, eblas bedaŭri la uzon de fakterminoj en ĝenerala teksto: oni povus diri la samon pli simple kaj klare.

Ignoro de sufero

Tiu inklino apartigi, dividi, fortranĉi parton de tutaĵo kondukas al miskompreno pri la identeco de la tipa esperantisto, almenaŭ se mi juĝas laŭ tiuj, kiujn mi konas. Kaj tio venigas min al la alia sento, kiun mi havis legante la Manifeston. Sento pri bedaŭro, sento pri manko.

La Manifesto ja komplete ignoras, ke en la mondo ekzistas lingva komunikproblemo, ke tiu problemo kaŭzas multegajn suferojn, kaj ke esperanto aperis kiel metodo kuraci la koncernan suferkaŭzon. Ne nur aperis kiel kuracilo, sed montriĝis efika kuracilo tie, kie ĝi estas aplikata.

Tiu mia vidmaniero intensiĝis, de kiam mi ek de pasinta jaro laboras kun rifuĝintoj. Kiom da turmentoj, komplikajoj, suferoj portas kun si la manko de lingva komunikilo! Kiam vi staras, kiel okazis al mi, antaŭ virino, kiu travivas histerian krizon, kaj kiu parolas nur albane, kaj via povo helpi estas praktike nuligita pro la manko de komunikilo, vi ne plu povas rigardi vian esperantistecon kiel la simplan plezuron esperantumi inter ni. Tiu persono klare bezonis psikologian helpon, kaj klare ŝi povus ricevi ĝin, se ekzistus

komuna lingvo kun la psikoterapiisto. Sed neniu komuna lingvo haveblis. En la saman centron iom poste alvenis rifuĝinto el Kosovo, kiu antaŭe lernis esperanton. Krom esperanto, li sciis nur la albanan. Nu, kvankam li ne dediĉis multe da tempo al tiu lernado, la situacio estis tute alia. Tiun junulon mi povis aŭskulti kaj helpi. Inter la aliaj rifuĝintoj de la centro, pluraj havas ian scipoveton de la angla, la germana, la rusa, kiujn ili lernis dum jaroj kaj jaroj. Sed kvankam ankaŭ mi dediĉis multe da tempo al tiuj lingvoj, la komunikado kun ili estas ege malrapida, sennuanca, senviva, laciga, unuvorte frustra. Ne sufiĉe efika por fari taŭgan laboron.

Similaj travivaĵoj estas por mi plia pruvo, ke la komunikproblemo estas grava homa problemo, ke esperanto estas solvo multoble pli efika ol la aliaj, kaj do ke ne fari ĉion eblan por konsciigi la socion pri la problemoj kaj ĝia solvo estas farmaniero asimilebla al rifuzo helpi endanĝerigitan personon. Kiam ekzistas malsano, kaj efika kuracilo estas konata, tiuj, kiuj ne provas diskonigi la efikecon de la kuracilo, ne faras tion, kion estus normale fari. Ne pro ia superegoa moralo. Sed simple pro la normala sento pri solidareco, kiu vivas en la ego, se tiu estas matura.

Mi do bedaŭras, ke la Raŭma Manifesto tute preteratentas la sensuferigan funkcion de esperanto, kaj ke pluraj el ĝiaj advokatoj kredigas, ke la problemoj ekzistas nur en la imago de la esperantistoj, ke la mondo ne bezonas esperanton, ke la homaro funkcias tute bone sen ĝi.

Tion mi ne povas akcepti. Situacioj de lingva kripleco (aŭ handikapo, se vi ne uzas ĉi-lastan vorton PIVe) estas multegaj, kaj esperanto ebligas ilin eviti. Problemo, kiun la plimulto ne konscias, povas esti sufiĉe grava por indi agadon kun la celo ĝin forigi. Loĝantaro submetita al atomradiado, kiel okazis en la najbareco de Ĉernobil', nenion sentas, kaj do nenion konscias, se oni ne informus ĝin. Ĉu tio pravigas, ke oni faru nenion? Ke la granda plimulto el la homaro ne konscias, ke ekzistas efika maniero venki la mutigojn, balbutigojn, malsuperigojn kaj nejustecojn kaŭzatajn de la nuna sistemo lingve komuniki, tio ne pravigas, ke oni lasu ĝin en ĝia nescio. La sola rezervo estas, ke oni respektu la liberecon, t.e., ke oni ne trudu la solvon al la koncernatoj. Sed inter trudi solvon, kaj konsciigi pri ĝia ekzisto, estas grandega diferenco.

Tri komuniksystemoj

Kiel mi klarigis en majo en la junulara forumo en Novosibirsk, kien mi estis invitita de la rusa TEJO-sekcio por pritrakti la problemojn de interpopola komunikado, en la nuna socio tri systemoj estas aplikataj por superi la malfacilaĵojn ligitajn al la lingva diverseco: la burokrata, la sovaĝkapitalisma kaj la demokratia. La burokrata estas tiu de UN, de la Eŭropa Unio kaj de similaj organizaĵoj: oni elspezas nekredeble altajn kvantojn da mono, tempo, kaj energio, elektra kaj nerva, por malaltnivela rezulto. La sovaĝkapitalisma estas tiu, kiu obeas la leĝon de la ĝangalo: la plej forta trudas sian lingvon, kiel okazis en la pasinta jarcento pri la franca, kiel okazas nuntempe pri la angla. La demokratia sistemo estas tiu, kiu ne donas apartan potencon al unu kulturo aŭ popolo, kaj kiu samtempe evitas la himalajajn malŝparojn kaj neefikecon de la burokrata sistemo. Esperanto estas pri ĝi bonega ekzemplo.

Por mi indas informiĝi pri la faktoj kaj ilin diskonigi. Rilate al la burokrata sistemo, ekzemple, al mi ne estas indiferente, ke Eŭropa Unio tradukas ĉiutage inter tri kaj kvar milionoj da vortoj, je tia kosto, ke ĉiu vorto kostas tiom, kiom necesas por savi la vivon de tri infanoj mortontaj pro diarea malsano. Kien iras la

mono de la socio, de la impostpagantoj, tio ne estas malgrava. Kompreneble, lingva komunikado estas nur unu aspekto de multe pli vasta problemo, sed ĝi estas aspekto, pri kiu eblas krei konsciigon. Se oni komparas la malaltajn kostojn de homa solidareco, kiu ne povas konkretiĝi manke de mono, kaj la altajn kostojn de la burokrata maniero lingve komuniki, oni tuj vidas, kiom indus restrukturi la nunan mondan komunikordon.

Simile, por mi ne estas indiferece, rilate al la sovaĝkapitalisma sistemo, ke pro ĝi milionoj da infanoj tutmonde suferas penante akiri lingvon, kiun ili neniam regos, kaj kies praktika utileco, en multaj situacioj, estas simple iluzia. Kaj ne estas indiferece, ke Usono, pere de siaj filmoj, magazinoj, romanoj, havas influon, kiu ŝanĝas la pens- kaj sentmanieron de tutaj popoloj, nur pro tio, ke la angla lingvo, pro sia potenca situo, peras ĝiajn t.n. kulturajn varojn ĉien en la mondon. Tiuj varoj staras en la dua rango en la listo de eksportoj el Usono. Ili havas hipnotan efikon en la monda socio ĝis grado kulture danĝera. Kiel substrekis antaŭ nelonge artikolo en *Time* (Frederick Painton, 'America: the price is right', *Time*, 22-a de aŭgusto 1994, p. 36), „En la tuta mondo ekzistas por ĉio usona nenegebla fascino, nutrata de hollywood-aj filmoj kaj de la usonaj televidaj serioj kaj felietonoj”. Ke unu kulturo influas la aliajn, tio tute ne ĝenus, se la fenomeno estus ĝenerala: okazus interfekundigo de la kulturoj, kiel, ĝis iu grado, okazas en la esperantomondo. Sed bedaŭrinde la kultura influo pasanta tra la angla estas unudirekta, tute ne okazas reciprokeco, kiel antaŭ ne tre longe rimarkigis alia usona ĵurnalistino: usonanoj ne spektas eksterlandajn filmojn, ne legas eksterlandajn romanojn, ne aŭskultas eksterlandajn kantojn, eĉ ne plu ĉerpas vortojn el aliaj lingvoj (Nicholas D. Kristof, 'Benefits of Borrowing Le Bon Mot', *International Herald Tribune*, 25-a de julio 1994).

Tiuj estas nur kelkaj ekzemploj inter multaj aliaj, kiujn mi povus citi. Pri la perversaj efikoj de la nuna monda komunikosistemo mi prelegos en Parizo en pentekosto venontjara, okaze de la Europa Esperantista Kongreso. Mi montros ilin detale. Ĉi tie, mi volas nur akcenti, ke, ignorante ilin, la Manifesto de Raŭmo, laŭ mia vidpunkto, preteratentas gravan aspekton de esperanto, t.e., la rolon, kiun ĝi povas ludi en la mondo por elimini multajn suferojn aŭ kulture danĝerajn situaciojn, kiujn la du aliaj sistemoj, la burokrata kaj la sovaĝkapitalisma, konstante pligravigas.

Mi kredas, ke la esperantistoj havas respondecon tiurilate. Ili estas en la situacio de kuracisto, kiu scias pri metodo povanta malpezigi suferon: li havas la respondecon diskonigi ĝin, eĉ se liaj fortoj estas minimumaj, eĉ se la socio, pro sia natura inerteco, pro la forto de la egoismaj interesoj, aŭ pro timoj vivantaj, nekonsciante, funde de la psiko, kontraŭas lin per intensa rezisto. Estas bedaŭrinde, laŭ mia opinio, ke la Manifesto de Raŭmo tute ignoras tiun aspekton de la esperantisteco.

La fina venko

La anoj de la Manifesto, en diversaj tekstoj, emas rigardi de alte, malestime, la esprimon „fina venko”, kiun niaj antaŭuloj tiel ofte kaj fervore uzis. Laŭ mi, ĝi tamen praviĝas. Kiam mi laboris en Tutmonda San-Organizo, oni tie parolis pri la *fina venko* super variolo. La koncerna institucio intense laboris por atingi tiun finan venkon, kaj, kvankam la ĝenerala publiko apenaŭ tion scias, ĝi sukcesis. Dank' al tio, ke variolo estis eliminata el la mondo, multegaj suferoj estas ŝparitaj al multegaj homoj.

Tio ne estas unika ekzemplo. Inter miaj konatoj troviĝas la respondeculo de la sama organizaĵo por la strategio kontraŭ poliomjelito. Ankaŭ li antaŭ nelonge diris al mi, ke la *fina venko* super tiu malsano, mondscale, aperas nun relative proksima. Eble min misformis mia dekjara laborado en medio dediĉita al publika sano, sed por mi la lukto kontraŭ la suferoj, frustruoj, maljustecoj, turmentoj kaj aliaj manifestiĝoj de la burokrata kaj sovaĝkapitalisma sistemoj de lingva komunikado apartenas al simila kampo. Ke temas pri psika, socia kaj interrilata bonfarto, kaj ne pri korpa, tio ŝanĝas nenion: ĉiuj aspektoj de homo estas ligitaj inter si.

Nu, kiel mi montris en mia libro *Le défi des langues*, la nuna lingva komuniksistemo en la mondo prezentas ĉiujn trajtojn, kiuj ebligas diagnozi ĝin kiel neŭrozon. Mi do ne vidas, kial ni devus malestimi tiujn, kiuj luktas por disvastigi la scion pri esperanto kaj la monda lingvoproblemo, kaj kiuj rigardas la atingon de tiu celo kiel „finan venkon”. Iom pli da toleremo ne malutilus.

Nun mi povas pliklarigi mian respondon al la demando: Kien esperanto? Mi diris komence, ke ĝi iras, kien ĝi iru, nome, al la fina venko. Tiu fina venko, por mi, konsistas el tio, ke la socio ĝenerale malkovros, kiom da suferoj portas kun si la nuna monda komunik-ordo (aŭ pli ĝuste: komunikmalordo), kiom kulture danĝera ĝi estas, kiom ĝi kondukas al etike neakceptebla elekto de prioritatoj en la uzo de la socia mono, ktp ktp. Konsciiĝinte pri ĉio ĉi, kaj pri la fakto, ke esperanto kuracas tiujn malbonojn, la socio akceptos la internacian lingvon kiel la normalan rimedon komuniki inter malsamlingvanoj. Pri la fakto, ke la fina venko iam estos realaĵo, alivorte, ke la mondo iutage akceptos novan, pli justan kaj oportunan komunikordon bazitan sur la uzo de esperanto (eble de alia lingvo kun similaj trajtoj), mi ne havas dubojn. Kion ni absolute ne povas scii, tio estas, *kiam* la afero okazos. Eble tio postulos kvar jarcentojn, eble nur du, eble jam post dudek au tridek jaroj ni estos tre proksimaj al ĝi. La ritmo de konsciiĝo estas neantaŭvidebla, kaj ŝancaj eventoj ĉiam povas roli.

Laŭ mia opinio, esperantistoj, malamikoj de esperanto kaj indiferentuloj povos akceli aŭ malakceli la procezon, sed ili ne povos influi sur ĝian laŭgradan plenumiĝon; tiu dependas de socihistoriaj faktoroj, kiuj superas la individuojn. Kompreneble, multo el tio, kion ni faras pri kaj por esperanto, dependas de nia volo, sed multego okazas sen partopreno de nia povo libere elekti.

Tion mi tre bone sentas pri mi mem. Mi ne povus ne okupiĝi pri esperanto, mi ne povus ne lukti kontraŭ la monda komunika fuŝordo. Ne mi kaptis kaj uzas esperanton, sed esperanto kaptis kaj uzas min. Multaj homoj similas al mi tiurilate. Jen eltiraĵo el letero, kiun mi ĵus ricevis el lando en Meza Oriento:

„Mi opinias, ke mi suferas de psika perturbo, kiu estas mala al tiu, kiun vi diagnozis ĉe la vasta publiko: la psika rezisto kontraŭ esperanto. Mi kredas, ke mi suferas de esperantozo, nome troa amo kaj korligiteco al nia lingvo, malsano, kiu manifestiĝas per konstanta okupiĝo kaj obsediĝo pri ĉiu temo rilata al esperanto (...) Fakte, mi ĝuas mian malsanon kaj ne vere suferas pro ĝi.”

Tiu homo petas de mi psikoterapian helpon, kaj estas tute klare el lia kompleta letero, ke li serioze taksas sin mensmalsana. Ŝajnas, ke li sentis sin nenormala pro la moko de la medio, vizitis psikiatron, kiu diagnozis lian intereson pri esperanto kiel obsedan / agrudan („obsedan / kompulsan”) malsanon. Sed tiu ideo venas nur de la konstato, ke lia emo esperantumi estas pli forta ol li, ol lia volo. Miaopinie, estas nenio

malsana en tio. Estus malsano nur, se la afero kaŭzus pli da sufero ol da feliĉo, se ĝi havus negativajn konsekvencojn sur la familion kaj ĉirkaŭantojn, aŭ se ĝi malhelpus lin funkcii normale en la praktika vivo. Sed se el tia obsedo rezultas nur socia bono kaj feliĉo individua, mi ne vidas, kial oni devus taksi ĝin malsano. Multaj sciencistoj, multaj homoj pasiaj pri sporto, hobbio, muziko au idealisma celo, kiu entute pliriĉigas la vivon de la homaro, havas similajn emojn, pli fortajn ol la propra volo. Ĉar esperanto estigas tiajn nemastreblajn impulsojn agi favore al ĝi en homoj plej diverskulturaj (mi konas plurajn ĉinojn, japanojn, sudamerikanojn kaj afrikanojn, kiuj prezentas tiun saman esperantozon), ni povas esti certaj, ke ilia influo iom post iom sentiĝos, kun la rezulto, ke la homaro ekkonscios pri sia malsana situacio rilate interpopolan komunikadon, kaj pri la valoro de la kuracilo „esperanto”.

Ke la socio ĝenerale estas malsana, oni povas vidi laŭ kriterioj similaj al tiuj, kiujn mi uzis pri la ĉi-supre citita korespondanto: la sistemo kreas pli da sufero ol da feliĉo, da frustruoj ol da kontentigo, da misfunkciado ol da efikeco, da maljusteco ol da justeco, ktp. Verŝajne, la esperantozo, kiun mia korespondanto imagas havi, estas respondo de la socio, de la historio, de homara kolektiva intuicio al la defio, kiun tiu misfunkciado prezentas al ĝi. Tial ĝi estas pli forta ol la individua volo ĉe la homoj, kiujn ĝi kaptas. Ni estas parto de saniga procezo socia, egale ĉu ni tion konscias aŭ ne.

Kompreneble, tio estas nur mia opinio. Multaj trovos ĝin fantazia, eble tro mistika, tiagrade, fakte, ke ili rigardos min frenezulo. Ne forgesu tamen, ke la kriterioj pri frenezeco estas tre relativaj laŭ la socio, laŭ la homgrupo, laŭ la psikologia aŭ psikiatria skolo. Uzu la viajn. Mi sentas min feliĉa kaj kreema en mia esperantisma agado, ĝi malutilas al neniuj, ĝi ne ĝenas mian ceteran vivon, mi uzas nek dormigilojn nek aliajn psikomedikamentojn, do mi havas sufiĉajn motivojn por konsideri min mense bonfarta (kio, cetere, estis oficiale agnoskita, kiam mi estis rajtigita praktiki psikoterapion).

Sed estas milionoj da diversaj manieroj mense bonfarti. Unu el ili estas fideli al sia esperantisteco, tamen ne akceptante mian mistikan vidpunkton. Alia estas entute forĵeti esperanton, kiel ion seninteresan. Mi do tute ne celas konvinki iun ajn, nur respondi al la peto de Nicole Margot, ke mi esprimu mian opinion pri la temo.

La Manifesto: ĉu dua stadio en dialektika procezo?

El ĉio, kion mi diris ĝis nun, vi eble ricevis la impreson, ke mia sinteno al la Manifesto de Raŭmo estas negativa. Antaŭ ol fini, gravas, ke mi korektu tiun impreson. Pri multo en la spirito de la Raŭma Manifesto mi plene konsentas. Fakte, miaj kritikoj, aŭ, eble pli ĝuste, la sento, ke mi situas alimaniere ol la aŭtoroj, rilatas nur al la du unuaj punktoj. Sed pri la tri lastaj punktoj mi samopinias. La celoj difinitaj akordas kun la miaj, la sola diferenco estas, ke miaj celoj inkluzivas ion alian, kiel mi ĵus klarigis, nome konscii la socion pri la kuraca efiko de nia miskonata lingvo. Ankaŭ pri la utileco de la kongresoj mi plene konsentas, same kiel pri la ideo, ke ni havas ion por diri, kaj ke tion ni devas montri al la mondo. Mi supozas, ke la Manifesto kontribuis iom pli sobriigi la esperantistaron, aŭ parton de ĝi, kaj tio estis necesa. Ofte estas utile, ke enamiĝinto resobriĝu.

Mi emus loki la Manifeston de Raŭmo en dialektikan procezon, laŭ la konceptado de Hegel. Tio klarigus la tendencon al apartigo, kiun mi vidas en ĝi. Laŭ tiu hipotezo, la starpunkto de la praelanoj

pritraktitaj en punktoj 1 kaj 2 estas la *tezo*. La Manifesto de Raŭmo pozicias sin klare kontraŭ ili. Ĝi do prezentas la *antitezon*. Eble la hodiaŭa kunveno preparas la alvenon de la *sintezo*. Ĉi tiu aperos, kiam ni konservos la bonajn punktojn de la Manifesto, aŭ de ĝia spirito, sed sukcesos mildigi ĝian netoleremon, la malestimon, kiun ĝi nutras rilate al la prceloj, kaj kompletigi ĝin per pli granda atento al la socia potencialo de esperanto, al ĝia kuraca valoro en mondo, kie lingvaj kripluloj estas pli kaj pli multaj, en homaro, kiu nepre bezonas Novan Mondan Komunik-Ordon.

Mi esperas, ke mi ne tro tedis vin per ĉi tiu longa babilado, kaj bedaŭras, ke mi ne estas inter vi por diskuti tiujn kaj aliajn samrilatajn punktojn. Nu, tiel estas. Mi salutas vin ĉiujn plej amike kaj deziras, ke via diskutado estu mense kaj kore riĉiga, estu fruktodona ĉiurilate. Mi dankas vin pro la atento.

Antologio XXXV

Claude Piron

Psikologo, psikanalisto kaj psikoterapiisto

Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto (1998)

Prelego en Bazelo

Enkonduko:

Multaj e-istoj plendas, ke la mondo ne komprenas iliajn vidpunktojn kaj ne interesiĝas pri Eo, aŭ ke la afero de la e-istoj ne progresas sufiĉe rapide. Ĉar la e-istoj deziras, ke Eo progresu, eĉ venku, ili reagis al tiu deziro kiel etaj infanoj, serĉante kulpulojn ekstere.

Kial la mondo ne komprenas nin? La ĝeneva e-isto kaj profesia psikologo Claude Piron (*1931) kredas, ke la socio ne komprenas la lingvan situacion ĝenerale kaj timas okupiĝi pri tiaj demandoj, ĉar demandoj pri lingva identiĝo estas psikologie tre tiklaj. La homoj, kiuj ne apartenas al la Eo-mondo, ne povas kompreni la psikologion de la e-istoj, ili simple ne komprenas tiun identiĝon de e-isto. La sinteno de multaj e-istoj aperas al ili freneza aŭ almenaŭ tre stranga. Lingvo kiu naskiĝis antaŭnelonge kvazaŭ en retorto kaj kiu estis kreita de unusola homo, ne povas esti lingvo, male ĝi respregulas specon de sakrilegio kontraŭ la tradicia monda lingvo-ordo.

Lige kun la temo la aŭtoro traktas en interesa maniero ankaŭ la problemojn de la 'stranguloj', kiuj aliĝas al la Eo-movado, kaj li alparolas la tabuojn en interpopola kaj interŝtata lingva komunikado.

Daŭrige al la kontribuo en parto XXXIV de ĉi tiu Antologio, ankaŭ per ĉi tiu prelego, prezentita dum la trilanda renkontiĝo la 21-an de marto 1998 en Bazelo, Svislando, Piron aliras la mondan lingvo-problemon el vidpunkto de psikologo. En ĉiam same brila kiel originala maniero la aŭtoro unu fojon pli provas klarigi al la iom frustritaj e-istoj la facetojn de ties identiĝo kun Eo kaj donas teoriajn kaj praktikajn konsilojn kiel plej bone elteni la konscion pri la laŭdira „malsukceso” de Eo. Malgraŭ rigidaj rezistoj kontraŭ Eo kaj la ideo de neŭtrala universala lingvo, la 'nekuracebla' optimismo Piron estas tamen konvinkita, ke Eo estos iam ĝenerale akceptita kaj ke ĝi nepre venkos.

Originala teksto (en Esperanto):

Oni povas aliri la mondan lingvoproblemon laŭ tre diversaj vojoj, ekzemple politika, lingvika [sic!], financa-ekonomia, ktp. Mi aliros ĝin, verŝajne pro profesia misformiĝo, el la psikologia vidpunkto, kies gravecon, miaopinie, ne estas ĝuste taksata.

Esperantistoj ofte plendas, ke la mondo ne komprenas ilian vidpunkton, ne interesiĝas pri ĝi, aŭ ke nia afero ne progresas sufiĉe rapide. Miaopinie, tiuj negativaj sentoj tute ne estas pravigeblaj, se oni konsideras la psikologian aspekton de la situacio. Alivorte, laŭ mi, Esperanto tute normale progresas, eĉ kiam ĝi malprogresas dum jardeko, kaj ankaŭ la konsciiĝo pri la monda lingvoproblemo antaŭeniras je normala ritmo, t.e. je la ritmo de historio.

La disvastigita ideo en la esperantistaro, ke la afero ne progresas sufiĉe rapide, fontas el unu el la plej gravaj eroj de la homa psiko, nome deziro. Ni deziras, ke Esperanto progresu, kaj ni reagis al tiu deziro kiel eta infano: ni ne volas vidi la amplekson de la obstakloj, kiuj staras kiel barilo inter nia deziro kaj ĝia plenumiĝo. Ni do sentas frustron. Kiam ni sentas frustron, anstataŭ fronti al la fakto, ke al ni dekomence realismo mankis, kaj sekve ke la fuŝo kuŝas en ni, ni serĉas kulpulojn ekstere: tiuj estos la cetera mondo, kiu ne atentis nin, aŭ la fuŝuloj en la Esperanto-mondo, kiuj ne agas efike kaj laŭcele. Tio estas infaneca, sed dirante tion mi ne kritikis, mi nur esprimas ion pri la normala funkciado de la homa psiko: kiam aperas forta deziro, ni emas reagi infanece. Malpacienti pri la progreso de Esperanto, serĉi kulpulojn, estas tute normale kaj nature. Tiel en la plimulto el la kampoj reagis normalaj plenkreskuloj. Ni ja estas maturaj nur pri kelkaj aspektoj de nia vivo. En multaj sferoj, kiel la politika, la metafizika, kaj la homrilata, ni daŭre reagis kiel etaj infanoj.

Nekomprene fare de la socio

Ankaŭ kiam mi diris, ke la mondo ne komprenas nin, mi tuŝis psikologian aspekton de la situacio.

Kial la mondo ne komprenas nin? Ĉar la socio ne komprenas la lingvan situacion ĝenerale. Kial? Pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, ĉar lingva rilatado estas io tre kompleksa, kaj ne estas facile kompreni ion kompleksan. Kiam io estas tre kompleksa, la natura maniero aliri la aferon estas simpligi ĝin. Sekve, la socio ĝenerale havas tre simpligitan bildon pri la lingva situacio en la mondo. Bildon nur skeman.

Alia psikologia kaŭzo, pro kiu la socio ne komprenas la lingvan problemon, estas timo. Tio eble mirigas vin. Kaj efektive, se vi diros al politikisto, aŭ al lingvisto, aŭ fakte al iu ajn surstrate renkontita, ke unu el la kaŭzoj, pro kiuj la mondo ne solvas la lingvoproblemon, estas timo, li aŭ ŝi rigardos vin, kvazaŭ vi estus freneza. Unue, ĉar por la alparolato lingvoproblemo simple ne ekzistas. „La angla solvas ĝin, aŭ la tradukistoj”. Kaj due, se entute estus problemoj, estas klare, ke ĝi neniel rilatas al timo. „Neniu sentas timon pri lingvo. Kio estas tiu frenezaĵo?” ŝi aŭ li diros al vi.

Sed multaj timoj estas nekonsciaj. Ni ne sentas ilin, kio estas bona afero, ĉar sen tio estus neeble vivi agrable. Sed fakto restas, ke tiuj timoj kaŭzas multajn fuŝtordojn, misgvidojn en nia maniero kompreni la realon.

Kial lingvo elvokas timon? Refoje, pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, lingvo estas ligita al nia identeco. Iun tagon en la infanaĝo ni ekkonscias, ke nia medio parolas tiun aŭ alian lingvon, kaj ke tio difinas nin, rilate al la cetera mondo. Mi apartenas al homa grupo difinita per la lingvo, kiun ĝi parolas. Do, en la profundo de la psiko, mia lingvo estas mi. La vasta uzo de la svisgermanaj dialektoj estas maniero diri: jen kiuj ni estas, ni ne estas germanoj. Aŭ rigardu, kiel reagas la flandroj aŭ la katalunoj: „se oni persekutas aŭ kritikis mian lingvon, oni persekutas aŭ kritikis min.”

Multaj homoj havas forĵetan sintenon al Esperanto, ĉar ili sentas ĝin lingvo sen difinita gento, do lingvo sen homa identeco, do aŭ ne lingvo, aŭ lingvo, kiu estas pli aĵa ol homa, lingvo, kiu estas, rilate al veraj lingvoj, tio, kio roboto estas, rilate al veraj homoj. Kaj tio timigas. Estas timo, ke tiu roboto, pri kiu oni diras, ke ĝi havas ambicion al universaleco, prempaŝos sur ĉiu alia lingvo, sur ĉiu popolo, sur ĉio individua kaj vivanta, detruante ĉion pasante. Tio eble ŝajnas al vi fantazia. Sed estas la vero. La psikologia metodo nomata klinika interparolo, en kiu oni esploras, kiuj ideoj aŭ bildoj asociiĝas unu al la alia, se oni petas personon diri, kio pasas tra la menso deirante de unu difinita vorto, ĉi-kaze „Esperanto”, rivelas la ekziston de tiu nekonscia timo ĉe multegaj personoj.

Identiĝo al la lingvo internacia

Unu el la problemoj de la esperantistoj devenas de tio, ke Esperanto havas trajton, kiu distingas ĝin de ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj, nome, ke ĝi favoras identiĝon al ĝi. Svedo kiu rilatas angle kun koreo kaj brazilano sentas sin nur svedo kiu uzas la anglan, li ne sentas sin anglalingvano. Kontraste, svedo kiu rilatas per Esperanto kun koreo kaj brazilano sentas sin esperantisto kaj sentas, ke ankaŭ la du aliaj estas esperantistoj, kaj ke la tri apartenas al iu speciala kultursfero. Eĉ se oni ege bone regas la anglan, neanglalingvano ne sentas, ke tio havigas al li anglosaksan identecon. Kun Esperanto okazas la malo. Kial?

Kiel kutime en la kampo, kiun ni hodiaŭ vizitas, la rolantaj faktoroj estas pluraj kaj kompleksaj, sed eble la plej grava estas, ke Esperanto integriĝas en la homa psiko je nivelo pli profunda ol ĉiu ajn alia fremda lingvo. Ne tuj, ne ĉe komencanto, sed ĉe tiu, kiun Janton nomas „matura esperantisto”, homo kun sufiĉa sperto pri la lingvo por senti sin hejme en ĝi. Kial ĝi situas pli profunde en la psiko? Ĉar ĝi, pli ol iu ajn alia homa lingvo, sekvas la naturan movon de la cerbo ĉe homo, kiu volas esprimi sin.

Nia plej baza tendenco, kiam ni lernas lingvon, estas ĝeneraligi la lingvajn trajtojn, kiujn ni lernis. Tial ĉiuj franclingvaj infanoj diras ‘des cheval’, ‘ĉevaloj’, anstataŭ ‘des chevaux’, aŭ ‘vous faites’, ‘vi faras’, anstataŭ ‘vous faites’. Tial ĉiuj anglalingvaj infanoj esprimas la koncepton ‘piedoj’ per ‘foots’ antaŭ ol akiri la ĝustan formon ‘feet’, aŭ la koncepton ‘li venis’ per ‘he comed’ antaŭ ol akiri la ĝustan formon ‘he came’. En Esperanto tiaj eraroj ne eblas, do oni rapide sentas sin sekura en la uzo de la lingvo. Krome en Esperanto oni estas multe pli libera ol en aliaj lingvoj. Tio validas pri la maniero rilatigi la vortojn unu al la alia. En la angla vi devas diri, laŭvorte: ‘li helpas min’, en la franca ‘li min helpas’, en la germana ‘li helpas al mi’. En la tri lingvoj ekzistas unu deviga strukturo, nur unu. En Esperanto vi povas libere elekti iun ajn el la tri. Same

estas pri la elekto de la funkcio de vortoj en frazo. Vi ofte povas elekti iun ajn el la adjektiva, adverba, verba kaj substantiva funkcioj, ekzemple diri: 'mi venis trajne, mi venis per trajno, mi trajnis'. Ne estas devigo tiurilate. Malmultaj lingvoj disponas la rimedojn, kiuj ebligas tian liberecon, kaj se ili havas ĝin, tre ofte oni ne rajtas ilin uzi. Krome, la Esperanto-medio estas tre tolerema pri gramatikaj kaj vortaraj fuŝoj, en mezuro neniam renkontata alilingve. Forgeso de akuzativo aŭ fuŝa uzo de ĝi estas, praktike, rigardata normala, probable ĉar tio preskaŭ neniam ĝenas la interkompreniĝon. Nur kelkaj pedantoj faras el tiaj eraroj dramon, sed ili situas ekster la normala medio Esperantista. (Atentu! Ne miskomprenu ĉi tiun rimarkon pri lingvaj eraroj kiel rekomendon! Mi situas sur tereno pure observa.) Alivorte, ne estas rilato inter perfekta uzo de la lingvo kaj la sento de identiĝo al ĝi. Oni povas *senti* sin esperantisto eĉ se oni ĉiufoje preterlasas akuzativon.

Ĉio ĉi, kaj ankaŭ la eblo krei vortojn laŭvole, kion oni ne rajtas fari en multaj lingvoj, kreas etoson de libereco, kiu lokas la lingvon en pli profunda tavolo de la psiko, pli proksime al ties kerno, al ties instinkta bazo. Estas pli facile esti spontana en Esperanto ol en la franca, ekzemple, ĉar oni devas observi malpli da arbitraj malpermesoj. En ĝi do oni sentas sin pli facile si mem. Pro tiaj trajtoj Esperanto fiksiĝas pli profunde en la psiko ol la aliaj fremdaj lingvoj, kaj pro tio oni multe pli emas identiĝi al ĝi. Sed la homoj, kiuj ne apartenas al la Esperanto-mondo, tion ne povas kompreni. Ili ne komprenas tiun identiĝon. Tial la sinteno de multaj esperantistoj aperas al ili freneza aŭ almenaŭ tre stranga. Pro tiu sento de identeco kun la lingvo, esperantisto facile sentas sin atakata, kiam oni kritikis la lingvon, aŭ eĉ la ideon mem de internacia lingvo. Ataki la lingvon estas ataki lin mem, kaj la natura reago estas kontraŭataki, kelkfoje tre akre. Sed tion la neesperantisto ne komprenas. Li do vidas en la normala reago de esperantisto ion tro intensan, tro fortan, pruvon de ia fanatikeco, kiu estas la sola ebla klarigo de reago tiel neproporcia.

Du kategorioj

Miaopinie, Esperantistoj psikologie apartenas al du kategorioj. Unuflanke, estas homoj, kiuj nebone adaptiĝis al la kolektiva vivo, kiuj sentas sin iom ekster la fluoj de la modo, de la socio, de la regantaj ideoj kaj manieroj agi. Homoj, kiuj kutimiĝis al la fakto esti malsamaj ol la plimulto aŭ kiuj sentas sin forĵetitaj aŭ forĵetataj de la plimulto. Ne estas facile preni sur sin la fundan solecon de la homa vivo. Tial homoj, kiuj sentas sin malsamaj ol la plimulto, emas kuniĝi, krei kun similuloj komunumon, en kiu ili sentos sin bone. Ili tiam kunvenas kaj rediras unu al la aliaj, kiom pravaj ili estas, kaj kiom malprava la ekstera mondo. Tio estas tute normala kaj homa. Esperanto prezentis al multaj personoj ne bone adaptitaj al la socio lokon por trovi similulojn same nebone adaptitajn, ĉe kiuj eblis trovi la konsolon kaj plifortigojn necesajn por igi la vivon pli elportebla. Tio estis aparte vera en la periodo, post kiam la unuaj esperoj pri tuja alprenado de Esperanto montriĝis vanaj, kaj antaŭ ol la argumentaro favora al Esperanto iĝis sufiĉe forta kaj fakta, alivorte inter la unua mondmilito kaj la jaroj sepdekaj / okdekaj. Granda parto de la Esperantistaro, tiuperiode, konsistis el neŭrozuloj, t.e. homoj kun psikaj problemoj pli multaj aŭ pli gravaj ol oni trovas ĉe iu ordinara.

Al tiuj neŭrozuloj, al tiuj homoj, kiujn psikaj problemoj kripligis, ni havas grandegan ŝuldon, ĉar sen ili la lingvo simple formortus. Estas naive kaj maljuste rigardi ilin de alte, kiel emas fari kelkaj advokatoj de la Raŭma Manifesto. En la historiaj cirkonstancoj, en kiuj ili troviĝis, tiuj iom sektecaj verdsteluloj necesis, por ke la lingvo disvolviĝu. Normaluloj ne povis interesiĝi pri Esperanto, uzi ĝin kaj do vivteni ĝin. Se Esperanto ne estus konstante uzata, se neniu verkus en ĝi, se ĝi ne utilis en korespondado, kunvenoj, kongresoj eĉ konsistantaj ĉefe el stranguloj, ĝi ne povus disvolvi sian lingvan kaj literaturan potencialon, ĝi

ne povus riĉiĝi, ĝi ne povus iom post iom konduki al pli profunda analizo de la monda lingvoproblemo. Mi estas certa, ke post kelkaj jarcentoj, historiistoj konsideros, ke tiuj homoj faris grandegan servon al la homaro, vivtenante la lingvon kaj progresigante ĝin, eĉ se iliaj motivoj parte kuŝis en iu psika patologio.

Apud la neŭrozuloj, la stranguloj, pri kiuj mi ĵus parolis, Esperanto allogis homojn kun aparte forta personeco. Homo, kiu estas psike tute sana, povas aliĝi al grupo tute eksternorma nur, se li aŭ ŝi havas tiel fortan personecon, ke li aŭ ŝi povas fronti al la amasoj kaj bazi sian starpunkton sur bazoj klaraj, seriozaj, elprovitaj, tiel ke li kapablas senti sin prava, tamen sen orgojlo. Feliĉe, da tiaj homoj troviĝis sufiĉe multe en la Esperanto-mondo ek de la komenco. Unu el ili, ekzemple, estis Edmond Privat. Ankaŭ al ili ni havas grandan ŝuldon, ĉar ili multe helpis progresigi la aferon, kaj iom post iom montri, en diversaj medioj, ke Esperantistoj ne estas nur stranguloj fanatikaj.

Kaj, klare, la du kategorioj havas intersekcion, t.e. homoj kun neŭrozaj trajtoj pli multaj aŭ severaj ol ĉe la averaĝa homo, sed ankaŭ kun pli forta personeco (ofte fortigita ĝuste per la konstanta devo ekzerci sin vivi en medio, al kiu oni ne sentas sin konforma aŭ plene adaptita).

Paradokso: kie estas mensa sano?

Ni do staras antaŭ paradokso: la Esperanto-mondo longe konsistis grandparte el homoj kun psika patologio, sed kiuj havis mense tute sanan pozicion pri lingva komunikado, dum la ĝenerala socio konsistas el homoj eble relative pli normalaj psike, sed kun tute neŭroza, patologia, mi eĉ dirus freneza, sinteno rilate al ĝi.

Kio ebligas fari tiel drastan aserton? Nu, la fakto, ke la socio prezentas ĉiujn simptomojn de psikopatologio en sia rilato al lingva komunikado. Kiam sentiĝas bezono, kion faras normalulo? Li agas por kontentigi la bezonon per la plej efikaj, agrablaj kaj rapidaj rimedoj. Imagu iun, kiu malsatas. Li havas en sia poŝo monujon plenan je monbiletoj. Li troviĝas en kvartalo kun multaj manĝaĵvendejoj kaj restoracioj. Se li estas normala, li iros en unu el tiuj, por serviĝi al si manĝon aŭ por aĉeti ion manĝeblan, kiu liberigos lin je la malsato. Kion vi opinios pri homo, kiu, anstataŭ tion fari, iras al la stacidomo, aĉetas bileton por trajnvojaĝo ĝis loko 300 kilometrojn for, kaj tie marŝas longe en la kamparo ĝis li atingas etan restoracion, kiu proponas nur malplaĉan manĝon? Kion vi opinios pri tia homo, kiu, pro sia stranga aliro al la problemo, malsatis dum horoj kaj fine ricevas ion ne tre kontentigan, kaj ĉio kostis centoble pli ol necesis? Ĉiu diagnozos tiun konduton kiel neŭrozan, patologian. Kial agi tiel komplike, sen profito por iu ajn, dum eblis solvi la malsatproblemon facile kaj rekte? En la kampo de lingva komunikado, Esperantistoj agas kiel la unua, la cetera mondo kiel la dua.

La ekzisto de rezisto konfirmas la diagnozon

Sed eble vi tamen havas dubon pri tio, ĉu la koncerna konduto vere estas patologia, kaj vi bezonas konfirmon pri la diagnozo. Nu, ni scias, ke unu el la karakterizoj de tiaj patologioj estas *rezisto*. La persono, kiu havas tiajn patologiajn trajtojn, faras ĉion ajn eblan por ne konscii, ke li aŭ ŝi ne agas sane, ke ŝi aŭ li povus agi tute alimaniere, multe pli agrable kaj efike. Kelkfoje la koncernato tamen agnoskas, ke tia konduto

estas nenormala, sed diras: „Jes, mi scias, ke tiel agi estas strange, nenormale, eĉ patologie, sed alimaniere mi ne povas fari”. Tiun rifuzon akcepti, ke la konduto estas nenormala, aŭ la neeblon ĝin ŝanĝi, oni nomas rezisto.

Nu, estas interese vidi, ke la maniero, laŭ kiu lingva komunikado estas organizita en nia mondo havas ĉiujn karakterizojn de patologia konduto. Esperanto ekzistas. Ĝi ebligas komuniki multe malpli multekoste ol samtempa interpretado, multe pli juste ol la angla, multe pli komforte ol iu ajn alia lingvo, kaj tio eblas post multe pli eta investo en tempon, monon kaj energion fare de la komunikantoj kaj fare de la ŝtato. Alivorte, ĝi estas la rekta vojo por kontentigi la bezonon. Sed anstataŭ uzi ĝin, la socio elektas tre komplikajn kaj multekostajn vojojn. Ĝi devigas milionojn da infanoj studi dum jaroj kaj jaroj fremdajn lingvojn tiel malfacilajn, ke nur unu el cent, meznombre, en Eŭropo, unu el mil en Azio, kapablas efike uzi la lingvon fine de la studoj. Post kiam estis investitaj tiom da penoj, da nerva energio, da tempo kaj da mono en tiun lingvoinstruadon, montriĝas, ke oni ne solvis la problemon de malegaleco, kaj ke oni tiel fuŝe atakis la lingvobariilojn, ke necesas investi ree milionojn kaj milionojn da dolaroj por pretigi tradukojn en dekojn da lingvoj kaj por prizorgi la samtempan interpretadon, sen kiu la komunikantoj ne povus interkompreniĝi. Tio estas freneza. Estas freneze uzi sian tempon, sian monon, sian penon en tiel fuŝa, tiel neefika maniero, kiam eblas tion eviti. Jam per tio la socio montras sin patologia.

Sed kio konfirmas, ke temas pri aŭtenta psikopatologio, tio estas la fakto, ke, se vi atentigas pri la afero la ĵurnalistojn, la decidantojn, la gravulojn, la respondeculojn pri la organizado de la socia vivo, kaj provas vidigi al ili, ke la sistemo estas freneza, kaj ke ekzistas mense *sana* maniero komuniki, multe pli facile atingebla, tiam vi estigas reziston. La homoj rifuzas konsideri vian atentigon, ili rifuzas esplori la aferon, ili forbalaas la atestojn kaj la pruvojn, *antaŭ* ol konatiĝi kun ili. Tiu vorto ‘antaŭ’ estas grava, ĉar ĝi estas la pruvo, ke la diagnozo estas ĝusta, ĝi atestas pri la rezisto. La respondeculoj de la socio preferas ne scii, ke ekzistas alia maniero komuniki interpopole, ol tiu, kiun ili trudas al la miliardoj da teranoj. Ili timas alfronti la veron. Kaj ĉar ili ne volas vidi, ke ili timas, kio estas plia pruvo pri la neŭroza, patologia karaktero de ilia konduto, ili uzas ĉiajn pretekstojn por ne malfermi la dosieron. La gravuloj do rifuzas ion ne sciante, ke ili rifuzas; ili timas nesciante, ke ili timas; ili kaŭzas embarason, maljustecon, frustron, kaj nenecesajn penadon, elspezadon, impostojn, komplikajn ĉiaspecajn, kaj konsiderindan kvanton da suferoj (mi aludas i.a. al rifuĝintoj, por kiuj la manko de lingva komunikado ofte estas kaŭzo de tre konkretaj suferoj), ili kaŭzas ĉion ĉi ne sciante, ke ili tion kaŭzas. Temas pri vere serioza, severa psikopatologio socia. Sed tre malmultaj personoj tion rimarkas kaj komprenas.

Tabuo

Fakte, tabuo tuŝas la tutan kampon de interpopola kaj interŝtata lingva komunikado. Se vi studas la dokumentojn, kiuj estas produktataj tiukampe, vi konstatas, ke multe pli ol 99 elcentoj prezentiĝas, kvazaŭ Esperanto ne ekzistus, kvazaŭ la homaro havus neniun sperton pri alia maniero internacie komuniki ol la kutimaj per tradukado, interpretado aŭ la uzo de prestiĝa nacia lingvo kiel la angla. Esperanto estas tabua. Oni ree tion vidis antaŭ nelonge en Bruselo, en la Eŭropa Parlamento, dum kunsido de la t.n. Institucia komisiono, kiu pritraktis la demandon pri (ne)komunikado en Eŭropa Unio. Kio pravas, ke temas pri io tabua, estas la rifuzo kompari.

En scienco, kiam oni volas scii pri la valoro de io, oni ĉiam komparas al referenco. Antaŭ ol decidi pri nova medikamento, oni komparas ĝian efikecon al jam konataj substancoj. Kaj kiam oni decidis fari tiun aŭ alian grandan laboron, ekzemple konstrui novan stadion, kion oni faras? Oni lanĉas ofert-alvokon. Oni proponas al la diversaj firmaoj submeti projekton, kaj oni *komparas* la diversajn ofertojn por akcepti la plej racian rilate al ĝiaj kostoj kaj al la aliaj kriterioj, kiujn necesas konsideri. Tio estas la normala proceduro. Fakte ekzistas tuta scienca metodo pri la arto decidi elektante la plej bonan manieron atingi difinitan celon. Tiun sciencan metodon oni nomas ‘operacia esplorado’ (‘operations research’, ‘recherche opérationnelle’). Ĝi naskiĝis dum la dua mondmilito kiel maniero elekti la plej bonan vojon por transporti varojn aŭ homojn plej rapide kaj kun malplej da risko. Nu, se oni aplikas la regulojn de operacia esplorado al la lingvoproblemo, oni konstatas, ke, el ĉiuj rimedoj nuntempe observeblaj en la praktiko, la optimuma, por atingi la celon estas Esperanto. Sed por tion trovi, necesas kompari la diversajn sistemojn unu al la aliaj, do vidi objekte, en la praktiko, (surterene, kiel oni nun diras), kiel Esperanto prezentiĝas kompare al gestoj, al balbutado en lingvo malbone regata, al la uzo de la angla, al tradukado de dokumentoj kaj interpretado de paroladoj, ĉu samtempa, ĉu posta, al uzo de la latina, ktp. Nur tia komparo ebligas konkludi, kiu estas la plej bona sistemo.

Sed kvankam miloj kaj miloj da paĝoj troviĝas en dokumentoj pri la lingva situacio, jen en UN, jen en Eŭropa Unio, jen en lingvikaj fakoj de universitatoj ktp. la dokumentoj, kiuj aliras la problemon surbaze de komparo inkluzivanta Esperanton estas malpli nombraj ol la fingroj de unu homo. Ĉar komparo de la diversaj eblaj solvoj al la problemo estas io tiel ofta alikampe, ĝia foresto en la kampo de internacia lingva komunikado pruvas, ke agas tabuo.

En kio radikas la tabuo?

Kial tiu patologia aliro al la lingvoproblemo? Denove la kaŭzoj estas multaj. Estas politikaj kaŭzoj. La ideo, ke la intelektaj plej netaŭgaj individuoj povu senbare komuniki de popolo al popolo malplaĉas al multaj ŝtatoj. Estas sociaj kaŭzoj. Tiu sama eblo malplaĉas al la privilegiitaj sociaj tavoloj. Homoj, kiuj scias sufiĉe bone la anglan aŭ alian gravan lingvon, havas multajn avantaĝojn super homoj, kiuj scipovas nur kelkajn lokajn lingvojn, ili tute ne deziras perdi tiujn avantaĝojn. Tio estas aparte videbla en la t.n. Tria Mondo.

Sed mi opinias, ke la ĉefaj kaŭzoj de la tabuo estas psikaj. La kerno de la problemo kuŝas en la emocia pezo, ŝarĝo, etoso de la koncepto ‘lingvo’, en ĝia povo vibrigi tre profundajn fibrojn de nia animo. Ni pensas per konceptoj aŭ vortoj. Kaj la vortoj aŭ konceptoj ne estas nur intelektaj aferoj, ili havas ian emocian, ian sentan etoson. Ne ĉiuj, sed multaj. Se mi diras ‘milito’ aŭ ‘mono’ aŭ ‘patrino’ aŭ ‘sekso’ aŭ ‘atomenergio’, io vibras profunde en vi, kvankam vi tion ĝenerale ne konscias. Alivorte, ni ne estas indiferentaj fronte al granda parto de niaj konceptoj, ĉefe al tiuj, kiuj estas iel ligitaj al niaj deziroj, bezonoj, aspiroj, plezuroj, suferoj, potenco, ktp.

Inter tiuj konceptoj kun forta emocia etoso troviĝas la koncepto ‘lingvo’. Kial? Ĉar la lingvo elvokas la fakton kapabli komprenigi sin, kaj la eblo esti komprenata estas unu el la plej bazaj deziroj de ĉiu homo. Kiam mi havas ian turmentan zorgon, aŭ suferon, se mi povas paroli pri ĝi al iu, kiu aŭskultos min kaj reagos komprene, mi sentos min helpata, okazos ia kundivido de la zorgo aŭ de la sufero, tiel ke mi ne plu sentos

min sola, mi fartos pli bone kun ĝi. Kiam bebo suferas kaj krias, tre ofte, pro nekompreneo, la reago de la apuda plenkreskulo mistrafas, aŭ tute ne venas reago, krom, survizaĝe, esprimo de senhelpeco. Sed kiam la infaneto akiris lingvon, kaj povas diri: „Doloras al mi en la orelo“, la reago de la plenkreskulo estas tute alia. Okazas vera komunikado, kiu ŝanĝas la vivon. Tial ke tiu komunikado plej ofte kaj plej save disvolviĝas kun la patrino, la emocia etoso de la koncepto ‘lingvo’ inkluzivas la sentojn pri ŝi. Pro tio la plimulto el la lingvoj diras ‘patrina lingvo’, kiam fakte temas pri la gepatra aŭ la media lingvo.

Fakte, akiri lingvon estas io tute banala. Tio okazas laŭ la normalaj vojoj de ĉia lernado. Estas nenio pli mistika en lingvoakirado ol en la asimilado de la kapablo regi aŭtomobilon. Tamen estas grandega diferenco inter la du. Pro la aĝo. Kiam ni lernas uzi aŭtomobilon, ni scias, ke ni lernas, kaj ni jam scias multegon pri la arto lerni, ĉar ni vizitadis lernejon multjare kaj lernis multon pri lernado. Sed kiam ni akiras la gepatran lingvon, ni absolute ne scias, ke ni lernas. Ni do vivas la aferon kiel miraklan. Antaŭe ni ne povis klare komuniki. Nun ni povas esprimi nin. Jen miraklo, kiu ŝanĝas la tutan vivon. Pro tiuj cirkonstancoj, en kiuj ni akiras lingvon, lernante sen scii, ke ni lernas, ke disvolviĝas tute banala lernprocezo, la lingvo fariĝas io sankta, io fea, io fabela, io mita. Io, kio situas ekster la kampo de racio. Io, pri kies deveno ni scias nenion. Por la plejprofundo de nia animo, lingvo estas donaco de la dioj, donaco supernatura. Neniu homo rajtas ŝanĝi ĝin. Neniu rajtas libervole kaj racie enmiksi sin en ion lingvan.

Vidu, kiel emocie la homoj reagas, kiam aperas propono ŝanĝi la ortografion. Rigardu atente la argumentojn, kaj vi vidos, ke nenio vere racia intervenas tie. Temas simple pri emocioj, la emocioj, kiujn ĉiam vibrigas la koncepto ‘lingvo’.

Kaŝita aŭtoritata mesaĝo

Tiu kerna sento pri lingvo kiel io mita, donita de la dioj, kaj do sankta kaj netuŝebla estas la plej kerna ero de la emocia aŭro de la koncepto ‘lingvo’. Al tiu kerno aldoniĝas la fakto, ke la koncepto ‘lingvo’ elvokas la plej unuajn rilatojn en la familio, ĉefe tiujn kun la patrino. Sed super tiuj du tavoloj alvenas tria: la rilato kun aŭtoritato. En la transdono de lingvo al infanoj, estas kaŝita mesaĝo, kiujn oni praktike neniam eksplicitas. Kaj tiu mesaĝo estas terure diktatora.

Fakte ĝi diktas la respektivan situacion de infano kaj plenkreskulo en la socio. Kiam infano parolas neĝuste, oni korektas ĝin, almenaŭ ek de kiam ĝi vizitadas lernejon. Se oni ne korektas ĝin, oni ridas aŭ mokas, aŭ ridetas signife. Kia ajn la reago, ĝi sentigas al la etulo, ke, kiam ĝi uzas tian formon, diferencan de la gramatike aŭ vortare ĝusta, ĝi troviĝas ekster la normo. Se eta franclingvano diras ‘plus bon’, oni diras al li: „Ne tiel oni diras, oni diras ‘meilleur’“. Eble ankaŭ en la germana oni ne rajtas diri ‘mehr gut’ aŭ ‘guter’ aŭ ‘güter’ kaj verŝajne infanoj uzas tiajn formojn. Tiam oni ilin korektas per frazo kiel: „Ne tiel. Oni diras ‘besser’“.

Kion tio signifas por la profundo de la psiko? Tio transdonas kaŝitan mesaĝon, jene: „Ne fidu vian spontan, naturan tendencon, kiu igas vin ĝeneraligi lingvan trajton, kiun vi rimarkis. Ne fidu vian logikon. Ne fidu la racion. Ne fidu viajn refleksojn, vian instinkton. Ne fidu vin mem. Obeu nin, eĉ se nia sistemo estas absolute neracia, malsaĝa.“

Por la infanoj ja la lingvo estas esence komunikilo. La unua ŝtupo en ilia pensado do estas: „Se oni komprenas min, estas en ordo. Lingvo ja estas farita por ke ni interkompreniĝu.“ Sed la reagoj de la medio pli kaj pli sendas la mesaĝon: „Lingvo ne estas io elpensita por interkompreniĝi. Lingvo estas kampo, en kiu oni lernas konformigi sin al la arbitraj, neklarigeblaj postuloj de la grandularo.“ En lingvo estas tabuoj, kiujn neniu povas pravigi. Se infano, kiu volas esprimi la ideon ‘li venis’ diras ‘er kommte’, ‘il a venu’, ‘he comed’, oni atentigas ĝin, ke ĝi devus diri ‘er kam, il est venu, he came’. Se tiam ĝi demandas: kial? Ne eblas doni al li racian respondon. Oni povas nur diri: ĉar estas tiel. Kaj tio subkomprenigas, ke la lingvo estas io regata de nekompreneblaj leĝoj, neniam klarigataj, kiuj radikas en la pratempo. Respekto al la praavoj aŭ al la dioj, kiuj donis la lingvon, estas pli grava ol logiko, ol racio, ol tendencoj spontanaj, instinktaj, do ol individua homa naturo.

Esperanto fuŝas ĉion ĉi. Ĝi naskiĝis antaŭ ne tre longe. Tio estas sakrilegio. Lingvo ne rajtas esti juna. Lingvo estas io sankta transdonita de la praavoj aŭ de la dioj, ne io, kio povas estiĝi nuntempe. Kaj oni diras, ke tiu lingvo ne havas esceptojn, tio estas krimo! Se oni povas sekvi sian naturon, sian logikon por esprimi sin, kio restos el la aŭtoritato de la prŭoj? Tial Esperanto kaŭzas terurajn timojn en la profundo de la psiko. Ĝi riskas perdiĝi al nia gepatra lingvo ĝian mitan, sanktan, fean karakteron. Ĝi relativigas ĝin, dum viglas emocia bezono, ke la gepatra lingvo estu io absoluta. Necesas ĉiarimede haltigi ĝian disvastigon. Kaj necesas ĉiarimede agi, por ke oni ne esploru pri ĝi. Oni eble vidus, ke lingvo ne estas tio, kion ni kredas, kaj tiel oni subfosus la bazon de la sociaj rilatoj. La afero estas tro emocia, por ke oni akceptu trankvile, objektive, science studi ĝin. Kaj trankvile, objektive studi la reagojn al ĝi.

Monstro

Krome, Esperanto aperas kiel monstro, ĉar oni diras, ke ĝin kreis unu viro. Alivorte, ĝi havas patron, sed ne patrinon. Ĝi estas la monstra produktaĵo de iu soleca perversulo. Al tiu ideo kontribuas multaj difinoj, troveblaj en vortaroj, enciklopedioj, prilingvaj libroj aŭ Esperantistaj informiloj, laŭ kiuj Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887. Fakte, Esperanto ne kreiĝis en 1887. En 1887 aperis semo de lingvo, kiu dum multaj jaroj antaŭe kreskis kaj transformiĝis en la menso de Zamenhof kaj sur liaj kajeroj. Post tiu longa procezo, kiu estas komparebla al la procezo per kiu laŭgrade kreiĝas semo en planto, la projekto publikiĝis, tio signifas, la semo estis jetita. Sed tiu semo povis iĝi io vivanta nur, se grundo akceptis ĝin. Kaj tiu grundo estas la patrino de Esperanto, tio estas la komunumo de tiuj unuaj vastkoraj idealistoj, kiuj akceptis la semon, kaj provizis ĝin per la medio, en kiu ĝi povis kreski, transformiĝi kaj fariĝi io sufiĉe vivkapabla por vivteni sin sendepende de iu ajn individuo.

Esperanto, kia ni uzas ĝin nun, ne estas la verko de Zamenhof, ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis surbaze de la projekto de Zamenhof per jarcento da konstanta uzado inter homoj ege diversaj. Ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis tute nature, per uzado, per verkado, per alterno de proponoj kaj kontraŭproponoj, plej ofte nekonsciaj. Ĝi ne estas monstro, kiun estigis iu homo sola, ĝi havas patron, jes ja, mirindan patron, patron, kiu sukcesis meti en ĝin nekredeble taŭgan vivpotencialon, sed ĝi havas ankaŭ patrinon, kiu flegis ĝin ame, kaj kiu, multe pli ol la patro sola povis, donis al ĝi vivon.

Faktoj estas pli obstinaj ol paroloj

Vi vidas, ke la psikologiaj aspektoj de Esperanto, kaj de la monda lingvoproblemo, estas multe pli kompleksaj ol oni unuavide imagus. En la psiko de la plej multaj individuoj troviĝas terura rezisto al la ideo mem de lingvo internacia. Pro tiu rezisto, preskaŭ neniu en la politika, socia kaj intelekta elito akceptas serene esplori la aferon. Kaj tamen ĝi progresos. Similaj kazoj de rezisto al io pli bona, pli oportuna, pli demokratia abundas en la historio. Plej tipa ekzemplo estas la rezisto en Eŭropo, kontraŭ la ciferoj, kiujn ni nun uzas, la hindaj / arabaj ciferoj: ankaŭ ilin la intelekta elito (kaj ne nur ĝi) sentis sakrilegio kontraŭ la romiaj ciferoj ĝis tiam uzataj. Mi estas konvinkita, ke Esperanto estos ĝenerale akceptita iam. La patologio ne eterne estos pli forta ol la kuracaj fortoj, ankaŭ kiuj agas en la socio. Inter tiuj kuracaj fortoj estas la pli kaj pli bona kompreno de la fenomeno Esperanto fare de lingvistoj, ekzemple, kaj de multaj aliaj personoj. Estas ankaŭ la postuloj de la realo. Kiel diris Lincoln oni povas kaŝi la veron al parto de la publiko dum parto de la tempo. Oni ne povas kaŝi la veron al la tuta publiko dum la tuta tempo. Esperanto, se oni komparas ĝin al ĉiuj aliaj rimedoj intergente komuniki, estas objekte la plej bona, per tre granda distanco, por ĉiuj kriterioj. Faktoj estas pli obstinaj ol ideoj. La rezisto plu daŭros kaj estos akra, jes ja, certe, eĉ se nur ĉar oni povas percepti ion nur kiam oni estas tiurilate preta, tiel ke, nuntempe, multaj homoj simple ne aŭdas, kion vi diras pri Esperanto: ilia menso ne estas preta, do viaj frazoj preterpasas sen penetri ĝin. Jes, la rezisto plu estos forta. Sed, kredis min, ĝi ne povos superi. La faktoj venkos. Vero venkos. Esperanto venkos.

Tazio Carlevaro

Kuracisto, psikiatro, interlingvisto

Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045 ? (1999/2000)

Enkonduko:

La 6an de marto 1999, okaze de laborkunveno de Svisa Esperanto-Societo en Berno, la tiĉina kuracisto kaj konata interlingvisto Tazio Carlevaro (*1945) prezentis la tezon, ke ĉefe pro la rapida progreso de la usonangla lingvo, Eo plej verŝajne ne postvivos la jaron 2045. Li avertis, ke siajn konkludojn li faris el la vidpunkto de fikcia ne-esperantisto (kiu nomiĝas Hans Dubois). La zorge preparita studo de Carlevaro, e-isto ekde 1957, do ekde baldaŭ 50 jaroj, liveris plenplenen da argumentoj kaj asertoj por pludiskutadi. Nature ĝi estis pridubata de diversaj flankoj, ne pro la fakto ke la angla lingvo progresas, sed pro la troa pesimismo de la aŭtoro. Laŭ Carlevaro la celo de la Eo-movado ne estas kontraŭbatali la anglan aŭ vidi danĝeran konkurenton en la angla lingvo. La e-istoj do prefere distanciĝu de la eterna traŭmato ĉiam devi kompari kaj mezuri Eon kun la angla lingvo.

La alia temo traktita de Carlevaro koncernas la internajn problemojn de la Eo-movado mem, ĝiajn bildon kaj prestiĝon ekster la movado, kiu laŭ li estas sufiĉe malfavora. Aparta ĉapitro estas dediĉita al la traktado de mitoj. Formulata estas la principa neceso forlasi la tradiciajn mitojn esperantajn, kiuj ne konformus al la bezonoj de la moderna mondo. La aŭtoro, kiu tute ne celas kulpigi la e-istojn, kies sindonan batalon li daŭre admiras, tamen bedaŭras, ke la Eo-popolo jam delonge perdis sian aktivan rilaton kun la fakta situacio lingva en la mondo. Laŭ Carlevaro Eo fakte fariĝis neutila lingvo en la monda praktiko. La pruvo por tiu aserto estus, ke praktike nenio grava en la mondo okazus en kaj per Eo. Eon oni ne uzus, ĉar ĝia komunika potencialo estus malalta, preskaŭ nula. Eo ankaŭ ne plu ekzistus en la konscio de la svisoj. Ĝi ludus neniun rolon en la nuna socio. Nek kiel io reala, nek kiel io ebla. Ĝi estus nevidebla kaj nevidata. Ĝi havus lokon en neniu projekto de socio, en neniu vizio de la estonto.

Ĉar la tradiciaj sloganoj de la e-istoj ne plu bone funkcias kaj la idealisma fono senkoloriĝis, la Eo-movado perdis sian memfidon, kaj kelkaj malprogresoj montriĝis. La ĝenerale tro konservativa Eo-movado grandparte izoliĝis, tiel ke oni devas serioze timi ĝian morton. Carlevaro venis al la konkludo, ke Eo ne funkcias kiel fakta internacia helplingvo, sed kiel sekreta lingvo de grupeto, kiu dezirus distingiĝi, t.e. konstrui iom post iom specialan konscion pri si. Male al aliaj lingvoj, Eo vivus nur tra kaj per la misieca aktivado de la e-istoj. Granda problemo estus ankaŭ, kiam novuloj volus lerni Eon kaj en la movado trovus malmultajn allogajn okazojn por praktiki ĝin. Aliflanke kaj eble ĝuste pro tio, Carlevaro ne bedaŭras, ke li lernis Eon, ĉar la esperanta mondeto havis multon pozitivan kaj ĉar la homaj spertoj estis multaj kaj interesaj.

Cetere la aŭtoro kontraŭ-argumentas la aserton de la e-istoj, kiuj diras, ke la lingva mond-ordo estas *maljusta* kaj *malpraktika*. Li male estas konvinkita, ke la nuna komunika mond-sistemo ne estas malpraktika. La angla funkcias bone: ĝi estus efika, pova, kaj ĝi 'kostus' malpli, ol se oni volus enkonduki Eon kiel novaĵon. Krome la angla ankaŭ ne plu estas la lingvo de elito, sed disvastigita tra vastaj tavoloj. La problemo de Eo estus, ke, finfine, la iama 'internacia', aŭ eĉ 'universala' lingvo transformiĝis al unu plia lingvo, al 'lingvo speciala'. Ironio estus, ke la e-istoj kontribuis al la plimultigo de Babelo, ne al ĝia solvo. Ĉar la solvo venis, sed de alia flanko. Ĉar Eo estus baldaŭ pasintaĵo, la ĉefa tasko de la e-istoj do konsistus, laŭ la vidpunkto de Carlevaro, en la *konservo de la memoro* pri Eo: kiel lingvo, kiel movado, kiel kulturo, kiel literaturo.

La eseo de Carlevaro aperis en 1999 kiel unua eldono kaj en 2000 kiel reviziita kaj pligrandigita eldono.

Pri la skribmaniero Carlevaro aldonis jenan klarigon: „Ĉi tiun studon mi skribis per neoficiala skribosistemo. Komprenoble, mi povus senprobleme transformi ĝin al teksto tute „zamenhofa”. Mi ne volis tion fari, ĉar se mi publikigus ĉi tiun eseon en la tuttera reto, mi *ne* povus uzi la zamenhofan sistemon, sed nur la cetere fundamentan „h”-sistemon, aŭ la eksterfundamentan „x”-sistemon. Do mi povus skribi nur ĉu *shanghi*, ĉu *sxangxi*. Kiun el la du mi elektu? Pro diversaj kaŭzoj mi elektis la „x”-sistemon, ĉar ĝi permesas tre facilan kaj rektan transformon al la “h”-sistemo, kaj al la supersigne zamenhofa ortografio.“

La reprodukto de lia teksto sekvas ĉi tie tamen laŭ la normala Eo-ortografio, pri kio la aŭtoro konsentas.

Originala teksto (en Esperanto):

Kiam la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, Bruno Graf, petis min prelegi pri la estonto de Esperanto en Svislando, mi longe hezitis. Ĉar mia prognozo pri la pluvivo de Esperanto estas, kiel konate, negativa. Foje mi estis aktiva esperantisto, kiu konvinkiĝis, ke la mondo deziras Esperanton. Mi opiniis, ke, se iu ne favoras Esperanton, la kaŭzo estas lia nescio pri la lingva demando. Bedaŭrinde montriĝis, ke tio estis malvera. La idealoj de la esperantistoj, nome *kaj* la lingvo mem, *kaj* la „interna ideo”, en nia mondo terure komplika, ne plu trovas lokon por esprimi sin, ĉar neniu plu aŭskultas nin. Montriĝis, ke la sola vera kaj venka forto de nia mondo ne estas la etika kaj la scienca evoluoj, sed nur la ekonomia disvolviĝo. Etiko kaj scienco, se ili volas pludaŭri, devas iel akiri utilitarisman trajton. Utilitarismo estas tezo, laŭ kiu la individuoj, preter siaj kredoj kaj opinioj, fakte elektas alternativojn, en kiu ili iel kredas, ke ili ricevos avantaĝon (materian aŭ moralan). Ĝenerale, temas pri senpere observeblaj, aŭ proksime ekspektataj avantaĝoj. Branĉo de sociologio studas la rezultojn de la ĝeneraligo de tiu konduto al tuta populacio.

Mi longe pripensis, kiamaniere proponi miajn ideojn, kiuj estas certe ne kutimaj, en formo, kiu laŭpove respegulu kaj miajn opiniojn pri la demando, kaj la metodon, per kiu mi analizis la demandon “Esperanto”, kaj la respekton, kiun mi sentas por idealisma entrepreno pli ol centjara, kiun mi longe ŝatis kaj praktikis.

Estas kurioze, ke en la mondo, nur la esperantistoj ne rimarkis, ke la epoko de la planlingvoj forvaporiĝis. Ĉar *ofte ni havas antaŭjuĝojn*.. Eble pro tio, ke estas malfacile pensi aliel, ol ni kutimis pensi dum jaroj. Tial, por prezenti mian temon, mi devis uzi metodon, kiun ĝenerale oni uzas en tiuj ĉi kazoj. Nome, mi devis momente rezigni pri miaj scioj, miaj sentimentoj, miaj deziroj, miaj konvinkoj pri Esperanto, Esperanto-movado kaj esperantistoj. Ilin iel „forgesi”, kaj enprofundiĝi ekskluzive en la kredoj, sentoj, konvinkoj, analizoj kaj konkludoj — ne de la malamikoj de Esperanto, sed de la ne-esperantistoj, kaj de la ne-esperantemuloj. Tion mi faris ekskluzive sur la bazo de la analizo de Esperanto-movademaj

esploremluj (kvankam la analizon fine mi faris ankaŭ sur la bazo de ekster-esperantistaj tezoj, kaj sur la bazo de sciencaj modeloj), kaj sur la bazo de ĵurnal-artikoloj.

Mia prelego prezentiĝis en Berno, kiel promesite, la 6-an de marto 1999. Jam tiam ĝi vekis kaj kontraŭstarojn, kaj aprobojn. Sur la bazo de la rimarkoj ricevataj, mi pretigis pres-eldonon de mia teksto. Ankaŭ tiu versio vekis ioman atenton: sur la bazo de kelkaj rimarkoj, mi plipoluris mian tekston. Tial, je la komenco de la nova jarmilo, mi proponas duan (kaj definitivan) eldonon. Mi profitis intertempe je la apero de kelkaj gravaj verkoj pri tiu temo.

La situacio de Esperanto

Mi pripensis longe, ĉu fakte eldoni ion tian. Mi kutimas de tempo al tempo halti, kaj demandi min, ĉu miaj viv-celoj estas ĉiam aktualaj, ĉu mi eble reviziu kelkajn el miaj valoroj. Ĉar nenio estas eterna. Ankaŭ ne celoj kaj motivacioj. Jam okazis, ke mi malkovras, ke mi eraris, kaj ke mi mistrafis aŭ blinde palpumis, en la kredo, ke mi sagocerte trafas. Cetere, Esperanto ne estis malgrava momento, almenaŭ ne ĉe mi. Esperanton instruis al mi ne iu obskura instruisto, sed mia saĝa avo, kiam mi estis 12-jaraĝa. Do Esperanto estas profunde ligita al la kresko de mia karaktero, al multaj eventoj de mia vivo, kaj al multaj aferoj, kiujn mi esperis kaj kredis. Povas esti, ke en 1957, kiam mi lernis Esperanton, estis klare, al kelkaj fakuloj, ke la angla jam estis la internacia lingvo. Sed laŭvere, mi ne rimarkis tion. Ĉar mi vivis en Svislando, kie delonge la instruo de la angla estis relative malgrava (ni devis unue lerni la francan kaj la germanan). Sed en tiu epoko, krome, Esperanto estis tre disvastiĝinta, multe pli ol nun. Mi bone memoras, ke, nur 12-jaraĝa, mi partoprenis al regionaj kunvenoj (Varese, Como, Lugano), kun centoj da partoprenantoj. Nun ekzistas plu neniu. En tiuj urboj kaj vilaĝoj ne plu ekzistas esperantistoj. Multaj tiamaj svisaj politikistoj, kaj multaj kleruloj tiutempaj, ĉu konis, ĉu scietis, ĉu aktive favoris Esperanton. Nun Esperanto, kiel politika, socia aŭ kultura temo, en Svisio, estas tute ekstertema.

Ne estas mia kulpo, nek la kulpo de la esperantistoj. Tute simple, siatempe ni kredis, ke nia speciala sentemo, rilate komunikadon kaj kulturon, estas komuna al multaj homoj, kaj ni ne rimarkis, ke, male, ni estas unikuloj. Pro tio, ni konstruis movadon, kiu emis al internaciigo, sed kiu fakte izoligis ĉiam pli. Ni ne kapablis altiri homojn, kaj konservi la interesitojn, kaj niaj idealoj, se entute, ne kapablis disvastiĝi.

La angla fariĝis la internacia lingvo. Nia esperantista mesaĝo neniam populariĝis, ĉar ĝi neniam korespondas al la vidpunktoj, al la deziroj, al la scioj kaj al la aspiroj de la granda parto de la populacio. Tio estas fakto.

La homoj kapablas lerni lingvon, nur se ili antaŭvidas avantaĝon (profiton). Estas certe, ke, se Esperanto permesus profiton, multaj homoj lernus ĝin. Kaj per tiu ĝenerala lernado, ĝi atingus pli altan nivelon de prestiĝo. Bedaŭrinde la idealoj kaj la planoj de la esperantistoj ne sukcesis. Sed ankaŭ la ĝenerala agado de la esperantistoj preteratentis tiun esencan fakton. Ili konstruis movadon, kaj kredis, ke tio sufiĉas por gravigi Esperanton. Sed nur la principo de *empiria utileco* („utilitarismo”) validas en sociaj demandoj. Ĉar montriĝis, ke nur tiu principo klarigas, kial okazas evoluo kaj ŝanĝo. Preter la kredoj, la esperoj kaj ofte la iluzioj de la homoj.

Bedaŭrinde, la esperantistoj ofte ne komprenas la terminon „profito“ en tiu senco, nome en la ekspektata rezulto de laboro „utilitarisma“. Ili tuj pensas pri malluma kapitalismo, pri usoneca influo, ktp. Ili ne vidas, ke objektiva analizo de la „kvanto de utileco de Esperanto“ bone klarigas la nunan situacion de ĝia movado.

Estas fakto, ke, el mia 43-jara laborado por Esperanto, mi ekspektis ioman rezulton. Ne la „finan venkon“, eble, sed ioman sukceson. Al miaj esperoj mi dediĉis multege da tempo, da pasio, da emocio, da mono. Kiel, cetere, ĉiuj esperantistoj. Estus nekredeble, ke tiu sindediĉo ne havu radikojn en ia ekspekto, ia atendo, ia espero. Neniu homo kapablas dediĉi parton de sia tempo, de sia laboro, de sia esto mem, sen ajna motivo. Nur maŝinoj povas.

Mi do ekspektis ion. Mi ekspektis, ke Esperanto akiros certan minimuman rolon en la internacia komunikado: nome en *kulturo* (literaturo, lingvoinstruado, filmo, ktp), en *scienco* (universitata instruado, lernolibroj, faka interŝanĝo en scienco), en *internaciaj organizaĵoj* (Eŭropaj kaj ekstereŭropaj), en *junulara politiko* (uzo en diversaj intergentaj kunvenoj). Kaj ke tiu utiligo ne dependu esence de kelkaj entuziasmuloj, sed ke ĝi havu faktan kaj *klaran rolon* - eble ankaŭ malgrandan - sed *oficialan*. Mi esperis, ke, en Svisio Esperanto havu ioman rolon en la intergenta komunikado. Kaj en 1957-70 la entuziasmo estis granda, la laboro estis intensa, kaj la diskutoj - ankaŭ en la ĵurnaloj, en la radio, en la politiko - estis viglaj kaj interesaj.

Kio konkretiĝis? Nenio. Tiu estas fakto. Nuntempe mi rimarkas, ke la movado rapide ŝrumpas. Ne nur ne ekzistas uzo en kulturo, scienco, internaciaj organizaĵoj, en junulara politiko, ktp. Sed oni nenie plu parolas pri Esperanto. Certe, ekzistas ankoraŭ esperantistoj, kiuj uzas Esperanton en kultura, scienca, intergenta, kaj junulara kampoj, sed temas pri Esperantaj uzejoj. En la *oficialaj*, fakte ekzistantaj, grandaj kaj influaj uzejoj, nur la angla uziĝas. Dum la lastaj 50 jaroj, en kiu loko, en kiu kampo (domeno), la uzo de Esperanto disvastiĝis, kaj en kiu loko, en kiu domeno, ĝi fariĝis sendependa de la ekzisto de entuziasmuloj? Nenie. Ne nur: eĉ la „entuziasmula“ uzo malprogresis.

Ne nur: mi rimarkas, ke la angla aperas ĉiam pli ofte en nia ĉiutaga vivo, en la muziko, en la ĵurnaloj, en la scienca uzo. De Usono niaj civitanoj transprenas ĉiam pli rapide kutimojn, aspirojn, ekspektojn, eĉ festojn. Kiam Svislando fariĝos US-ŝtato? Mi rimarkas, ke tiuj konstatoj ĝenas multajn esperantistojn. Iuj inter ili neas, ke estas tiel, aŭ kredas, ke temas pri momenta fenomeno. Aliaj inter ili konsideras tion tre negative, kaj alarmas la mondon, pri iom-post-ioma usoniĝo. Ĝenerale, oni perceptas ĉe ili pli-malpli klare esprimitan kontraŭ-usonan sintenon. Dum la tuta mondo ĉiam pli rapide direktiĝas al kultura usonaniĝo, la esperantistoj ne sekvas la tajdon. Se ili tion farus, ili kompreneble nur malfacile povus paroli pri Esperanto.

Povas esti, ke la tuta diskuto ĉi tie prezentita ne plaĉos al multaj homoj. Povas esti ankaŭ, ke la konkludoj ne trovas la konsenton de aliaj homoj. Sed almenaŭ la prezentitajn faktojn oni devus foje ekkoni. Cetere, en 2045 mi ne povos vidi, ĉu mi pravis aŭ ne, ĉar mi aĝus precize 100 jarojn. Kaj en mia familio, oni ne atingas altan aĝon, bedaŭrinde.

Naskiĝo kaj morto de la „sankta espero”

(...) Zamenhof kredis al la tutmonda rolo de sia lingvo. Li konsciis, ke planlingvo estas ja korolaro de lia etika ĉeftezo, sed ke, favore al planlingvo, parolas ankaŭ alispecaj faktoroj, kiuj baziĝas sur la utileco de tia internacia lingvo. Certe li sopire revis, ke Esperanto iĝu foje la komuna helplingvo de la tuta homaro. (...)

Ĉiuj pioniroj de Esperanto esperis la „finan venkon“. Ili kredis, ke la celoj de la Esperanto-movado estas tiom evidente bonaj, ke ili fariĝos propraĵo de la homaro. Ili antaŭvidis, ke rapide Esperanto atingos internacian agnoskon. (...)

Ĉar la situacio dependas de tio, ĉu la movado atingis aŭ ne atingis sian celon. Se la celo estas atingata, la movado perdas sian ĉefrolon, kaj ĝi iom post iom kadukiĝas. Se la celo montriĝas neatingebla, la movado krizas, skismiĝante, kaj ĝi riskas malaperi.

Sed ne ĉiuj anoj konsentas kun la forvoriĝo de la movado. Eble ĉar ili tiras certan avantaĝon de ĝia ekzisto. Eble ankaŭ nur moralan. Ili do transformas ĝin al movado „normala“, kun ĝiaj iamaj celoj, kies atingon oni tamen plusendas al iama estonta tempo, kiam la cirkonstancoj estos pli favoraj. Aŭ kiujn oni deklaras „atingitaj“, kvankam ne en la tradicie ekspektata maniero. Do, kvazaŭ *metafore* atingitaj. Neniu movado malaperas volonte kaj per propra mano. La celoj eniras specon de empireo, kaj la movado fakte alidirektiĝas.

Ni vidas tion tre klare en la Esperanta movado. Ĝi kreskis iom post iom ekde 1887, sed impete kaj rapide inter 1903 kaj 1922, malgraŭ kelkaj krizoj. Grandan baton por Esperanto reprezentis la fakto, ke pro diversaj kaŭzoj (certe ne pro la mondo-milito) ĝi trovis nenie akcepton kaj faktan uzon. Plej gravis la malakcepto ĉe la Ligo de la Nacioj, ĉe la Komunista Internacio, kaj en la sciencaj medioj. Precize tien, kie Esperanto ŝajnis esti bezonata, ĝi ne sukcesis eniri. Iusence, inter 1918 kaj 1928 la destino de Esperanto kaj de la aliaj planlingvoj trovis sian definitivan konkludon. La homoj ne deziras ion tian. Eĉ se temas pri ideo interesa, ne eblas feliĉigi la homojn kontraŭ ilia volo.

En la movado, tiam *restas la celoj*, kiuj estis je la ideala bazo de la fiaskinta aktivado. Ili tiam eniras specon de empireo, kaj la movado fakte alidirektiĝas. Formiĝas kulturo de fermita grupo, kiu esence celas *garantii nur la pludaŭron de la movado mem, kaj ne la originan celon*. Komence, estas necese trovi la kaŭzon de la malsukceso, kaj la klarigon pri la neceso prokrasti la atingon de la celoj. La Esperanto-movado volis plu vivi, malgraŭ la maltrafo (Symoens 1988). Tio eblas, ĉefe se ĉiuj kredas al komuna celo. Fakte, la ekzisto de la Esperanta komunumo pravigas la ekziston de Esperanto. Sen ĝi, ne ekzistus Esperanto. Kaj inverse.

Certe, la Esperanto-movado estis tiam forta kaj hardita, kaj cetere ĝi konsistis el multaj anoj, kun specialaj kredoj („interna ideo”, lojaleco al Zamenhof-idearo, netuŝebleco de la lingvo), kaj kun jam relative granda organizo. Ĝi povis do plenkonstrui relative fortan kaj multflankan organizaĵon, kies servoj stimulis la tiamajn esperantistojn. Tio kontribuis al ioma kresko de la movado mem, eĉ post la fakta historia malvenko. (...)

Male, la *Ido-movado* estis malpli forta kaj malpli hom-riĉa. Ĝi tuj spertis la krizon de la rifuzo, kiu

tuŝis ja Esperanton, sed eĉ pli intense Idon. La idistoj kutimis rezoni „lingvistike”. Ili kredis, ke Esperanton oni ne akceptis pro lingvaj kaŭzoj. Nur pli perfekta projekto povus havi ŝancon internaciigi. Kiam ili rimarkis, ke ankaŭ Ido neniun politika instanco volas, ili forlasis ĝin, ĉar ili opiniis, ke tiu fiasko ŝuldiĝas finfine al la lingvo mem. Ili migris al pli „moderna” lingvo, *Occidental* (Carlevaro, Haupenthal 1999). Tio estis, kompreneble, granda eraro. Ni observas tion en la rapida falo de libro-apero ekde 1928-9.

La „plejo” de la Esperanto-movado ne produktis pluan progreson, ĉar la dua mondo-milito radikale ŝanĝis la medion, en kiu la Esperanto-movado laboris. Aparte, akcelante la disvastigon de la angla lingvo, la lingvolernon en la lernejoj, kaj la turismon. Revenis la demando pri la prceloj: kio do, ne tiom pri la Esperanto-movado, sed pri la lingvo mem? Iusence ni proponas hodiaŭ *malnovajn receptojn*, kiujn la oficialaj kaj neoficialaj instancoj rifuzis jam inter 1914 kaj 1928. La ekstera publiko scias tion, kaj perceptas, ke Esperanto estas interesa komunika alternativo, kiu „iam floris”, sed kiun hodiaŭ oni ne plu „vidas” aktivi. Ĉar ni kapablis puŝi la prcelon al loko, kie ĝi ne plu ĝenas.

Plej granda parto de la esperantistoj konscias pri la gajno de la angla, kaj ke la „prcelo” fariĝis arkivaĵo. (...)

Kelkaj esperantistoj ne kapablis ĝisnun kompreni kelkajn elementajn faktojn, nome ke la tempo marŝas antaŭen. Ili ankoraŭ analizas, kial Esperanton oni politike kaj socie neglektas. Ekzemple Gudskov (1997) ankoraŭ kredas, ke sufiĉas prezenti kaj ekspliki la teruraĵojn (moralajn kaj materiajn), kiuj okazas en la internacia komunikado, por ke la homoj konvertiĝu al Esperanto. Fakte, pli probable Gudskov estas bona ekzemplo de la fakto, ke por retrovi motivadon al la laboro poresperanta oni devas konvinkiĝi, ke per sia laboro oni feliĉigas la mondon. „La nepoj vin benos...”. Jen kelkaj el la tiutemaj tezoj.

- Esperanto estas necesa al la monda paco. (...)
- Multaj malamikoj de la monda lingvo kontraŭas Esperanton, ĉar ili volas plupuŝi sian solvon. (...)
- Apogo de granda ŝtato aŭ ŝtat-grupo estas necesa por la enkonduko de Esperanto. (...)

Ĉar, fakte, bedaŭrinde, la esperantistoj kaj Esperanto ne ĝuas bonan famon. Ilia *image* (publika bildiĝo) estas negativa. Esperanto dum la lastaj jardekoj malaperis el la komuniko-konscio de la Eŭropanoj.

Reago de la esperantistoj

Movado enfermita en propra rondo iom post iom mortas, tiom pli ke ĝia celo estis transirigi Esperanton al ĝeneraligita uzo en la mondo. Tial, por firmigi sian movadon (Ejsmont 1988), sed samtempe ligi ĝin kun la mondo, la esperantistoj komencis partopreni la „eksteran” kulturalan vivon, modernigis siajn programojn, edukis siajn gvidantojn, konstruis siajn valorojn, celojn, metodojn, ilojn. Ili komencis *projekti idealan mondon*, en kiu iamfoje estonte estos loko por Esperanto, kvankam en la nuna momento trovas ĝuon en Esperanto nur la movadanoj, ĉar Esperanto permesas kreon kaj firmigon de interhomaj ligoj. Certe, tiu Esperanta mondeto havas multon pozitivan. Iusence, post pli ol 40-jara esperantisteco, valoris la penon lerni Esperanton, ĉar la homaj spertoj estis multaj kaj interesaj. Sed la demando ne estas principe tiu.

(...) Novuloj, male, ne povas longe esti altirataj de io tia. Ili venas, interesiĝas, lernas la lingvon, kaj kiam ili konstata la faktajn *limojn* de tia movado, ili baldaŭ malinteresiĝas. Kelkaj el ili, komence, opinias,

ke eblas ŝanĝi la situacion per *pli bona organizo*, per *pli bona informado*, per *pli trafa argumentado*. Sed preskaŭ ĉiam kaj preskaŭ ĉie montriĝas, ke tio ne estas efika. *La rilato inter forlaso aŭ daŭrigo en Esperantio dependas do de la utileco de la lingvo.*

(Ĉi tie la aŭtoro demandas sin kial esperantistoj restas lojalaj al la movado multajn jarojn. Kaj li provas respondi per analogio. „Normala” homo ĉesas hazardludi, se li perdis la monon. Se la ŝuldo atingis 10 '000 frankojn kaj ne emos haltigi la hazardludon, oni tiu homo, jam investinte sufiĉe multe da mono, des pli sentas sin devigata pluludi, unue por ne forjeti la jam investitan monon, due por esperi gajnon por povi repagi la ŝuldon. Kaj Carlevaro supozas, ke longjaraj esperantistoj estas tiuspecaj homoj, kiu investis tro da tempo, mono kaj energio en la Esperanto-movadon tiel ke ili ne povas rezigni, daŭrigante tiun investon).

Kelkaj trajtoj de la movado

La esperantistoj, rilate sian movadon, estas konservativa populacia grupo. Ili iel sentas, ke ilia movado, ekde 1960, estas fakte *Rückzugsbewegung* (malŝvel-movado). Movado, kiu servas al preservo kaj al enmuzeigo de la iamaj zamenhofaj esperoj. Parto de la ideologio de Esperanto estas fakte socio-psikologia konstruo, kiu celas defendi, klarigi, popularigi, kaj tial savi la nunan funkciadon kaj sinkredon de la movado mem, malgraŭ la malatingo de la zamenhofa pravelo. Ĝuste la malatingo de la pravelo devigas la esperantistojn pripensi pri la nunaj signifoj kaj rolo de la Esperanto-movado. (...)

(Ĉi-sekve la aŭtoro parolas pri la termino „Eo-popolo”)

La Esperanto-popolo havas delonge neniun aktivan rilaton plu kun la fakta situacio lingva en la mondo. Tial ĝi aspektas fakte nevidebla: ĉar ĝi ludas neniun rolon en la nuna socio. La mondo irus same bone kaj same malbone ĉu *kun* ĉu *sen* la Esperanto-movado.

Ĝi estas tiom konservativa, ke ĝi *sanktigis ne nur la lingvon* (pere de la *Fundamento*), sed ankaŭ unu el la lingvaj apartaĵoj, kiu speciale malpermesas ĝian publikan aperon, eĉ en la malmultaj lokoj kaj momentoj, kiam tio eblas. Nome la ortografion. Aparte, tiu ortografia sistemo malhelpas ĝian uzon eĉ en la plej moderna tutmonda komunikilo: la tuttera reto (WWW). Laŭvere, kelkaj esperantistoj rimarkis tion, kaj ekpropagandis kelkajn ortografiajn reformojn (mi mem uzas unu el ili). Tre bone. Sed ili kredas, ke nur ilia reform-ortografio permesos la oficialigon de Esperanto. Ni estas ĉiam je la nivelo de kelkaj idistoj.

Ĉu Esperanto diras ankoraŭ ion al la mondo?

Indas demandi nin, ĉu Esperanto havas ankoraŭ ion por diri al la mondo, ĉu la Esperanto-movado havas ankoraŭ mision, aŭ celon en nia mondo. (...)

La Esperanta movado perdis sian memfidon, kaj kelkaj malprogresoj montriĝis. La sloganoj ne plu bone funkcias.

La idealisma fono senkoloriĝis, ĉar la *Zeitgeist* (epok-etoso) ne plu estas favora. Fakte, la nuna mondo montris, ke ĝi tamen atentis pri paco, pri justeco, pri internacia juro, pri rajtoj homaj kaj bestaj, ktp, multe pli ol antaŭ deko da jaroj. Ankaŭ la esperantistoj havis proponon en tiu direkto, sed la rimedojn, kiujn la esperanto-movado konsideris oportunaj, la mondo rifuzis. Eble pro la fakto, ke la Esperanto-valoraro estas bazita iom tro sur bonvolo, sur kulturo, sur lingvo, sur eduko, sur kredo. Tiu valoraro estas parte tro psikologia, parte tro simpligita por funkcii en la nunaj komplikegaj cirkonstancoj. Sed fakte por la esperantistoj ĝi restas centra.

Propagandcele, la esperantistoj tamen substrekas *kaj* la idealismecon de la Esperanto-movado, *kaj* la raciecon de la solvo Esperanto.

La apartaj “mitoj” de la Esperanto-movado

La Esperanto-movado transformiĝis, de loza batalmovado, al movado, kiu devis ekipi sin por “trapasi dezerton”, t.e. por atendi la estontan venkon, kiun oni imagis en pli fora tempo. Do ĝi devis ellabori proprajn *mitojn*. Mito celas simbole reprezenti ion komunan en ĉiuj anoj de difinita populacio. Ĝi estas speco de komuna gluo je kredo- kaj penso-nivelo. Analoge, rito estas komuna ceremonio, kiu celas kunigi la partoprenantojn, transdonante senton pri aparteneco. Ekzistas multnivelaĵoj mitoj kaj ritoj. Kaj mult-temaj. Ili koncernas, ĝenerale, la historion de la homgrupo, la devenon de la fondintoj de tiu homgrupo, la bildon, kiun la grupanoj flegas pri si mem, la celojn, kiujn ili deziras atingi, ktp. Kompreneble ili ne koncernas la veran devenon, la veran historion, la verajn biografiojn, la verajn celojn. Ankaŭ la mitoj, kiel la ritoj, evoluas. Ili dependas de historiaj cirkonstancoj, de specialaj momentoj, de modoj, de ekstergrupaj influoj, de ioma riĉiĝo, aŭ de rapida malriĉiĝo. Kelkaj estas praaĵ. Kelkaj - pli modernaj. Kelkaj pli atentigas nin al la *valoroj*. Kelkaj atentigas nin al *agado*, al praktikado, al la fakta vivo (al *pragmatiko*). Kiuj estas la ĉefaj mitoj en Esperantujo? Certe multaj. Kelkaj estis mirinde ekzamenitaj en la elstara verko de Sikosek (1999). Kun la verkoj de Ulrich Lins, temas pri la supozeble sola fidinda libro pri diversaj aspektoj de la Esperanta ideologio (t.e. mitologio). (...)

Mitoj pri la lingvo mem

- Esperanto ne estas planlingvo, ĉar ĝi transformiĝis al vivanta lingvo. (...)
 - Ĝi estus la plej taŭga propedeŭtikilo al lingva lernado (Frank 1994).
 - Principe, lingvo kia Esperanto estas aparta ilo por praktiki lingvan demokration.
 - *Esperanto proponas helpojn lerni aliajn lingvojn.*
- Certe, sed ĉiu fremda lingvo, supozeble, estas oportuna bazo por lerni pluan lingvon.
- *Esperanto garantias helpojn en specialaj kazoj.*
- Se vi scias la anglan, tio estas pli facila: en multaj partoj de la tero ne ekzistas esperantistoj.

- *Per Esperanto, vi ricevas sendiskriminacian traktadon.*
 Tio peras multaj aliaj movadoj, ne nur la esperantista movado.
 - *La Esperanto-movado proponas modelon de nova mondo.*
 Tio estas malreala. Tio pli similas al deziro, al aspiro, ol al realaĵo.
 - *Esperanto reprezentas valoran hobion por interesaj aktivadoj.*
 Tio veras, sed nur interne de la mondeto esperantista.
 - *Esperanto peras konatiĝon kun interesaj homoj.*
 Cetere, ankaŭ la itala, la greka, la zulu, la angla peras similajn spertojn.
 - *Esperanto permesas realigon de propraj talentoj en turismo, internacia kulturo.*
 La angla multe pli, gigante pli, sed ankaŭ la franca, la germana, la hispana. (...)

Konklude pri tiu listo. La fakta uzo de Esperanto permesas malmulton, kaj eĉ tiun malmulton, ne bone, ne komplete, ne plene. Nur niĉe, ja. (...)

Esperanto ne funkcias kiel fakta internacia helplingvo, sed kiel sekreta lingvo de grupeto, kiu deziras distingiĝi, t.e. konstrui iom post iom specialan konscion pri si. En tiu senco, ekzistas specialaj lokoj, kie kunveni, por tie specife aktivi (fakte: paroli en Esperanto kaj pri Esperanto). Tiu kurioza homgrupo havas siajn sanktulojn, heroojn, martirojn. Ekzistas eĉ profetoj kaj akompanantaj predikantoj. Al tiu celo oni rekrutis eĉ Albert Einstein!

Sed bedaŭrinde, la „ekzempleco” de tiu mondeto estas relative malriĉa. Kaj tiu „ekzempleco”, bedaŭrinde, ne estas „ekzempla” por la ekstera mondo, kiu nenion rimarkas el ĝi. Kiam Umberto Eco asertis, ke li volonte vidus Esperanton roli kiel ĝenerala lingvo en aerhavenoj, multaj esperantistoj grumblis, ĉar eĉ Eco „nenion komprenis”. Eco tre bone komprenis, male, ke la ekspekto de la mondo por internacia lingvo estas ĝuste tio. Bedaŭrinde nun tie paradus la angla, kaj Esperanto ekskludiĝis jam delonge.

(Sekvas kelkaj klarigoj pri mitoj pri Esperanta kulturo, mitoj pri defendo je lingvaj minoritatoj, mitoj pri la Esperanta turismo, mitoj pri la ekologia misio de la Esperanto-movado, mitoj pri transetna identiĝo, mito pri la neevitebleco de Esperanto).

Neceso de propagando

Ĉiu lingvo disvastiĝas per natura disradiado. Se ĝi estas utila, depende de la cirkonstancoj, oni lernas ĝin. La latinan oni ne propagandis. Ĝi estis ilo de la registaro kaj de la kulturo. La francan oni ne propagandis. Ĝi estis la iama lingvo de tuteŭropaj kleruloj. La svisgermanan, en Alemanio, oni ne propagandas. Ĝi estas la normala komunika lingvo, sen kiu vi ne povas interkompreniĝi. Male, Esperanto vivas nur tra kaj per la misieca aktivado de la esperantistoj. Ĉiu propagando estas duflanka. *Interna* kaj *ekstera*. La interna propagando estas fenomeno konata kaj necesa: indas disvastigi mitojn kaj ritojn pri la origino, la kerno, la celoj de Esperanto ankaŭ interne de la Esperanto-movado.

Sed indas paroli pri tio ankaŭ ekster la Esperanto-movado. Ekstere, la informado pri Esperanto ne multon atingas. Ankaŭ la homaranismo, en la formulado de la esperantistoj, hodiaŭ ne plu influas multajn homojn. Ĝi aspektas male kiel efika interna glu-ideologio interne de la movado, apud la modeste pragmatika propagando pri praktikado.

Certe, kiel asertas Janton, la „praktikema” doktrino pri la rolo de Esperanto rapide montriĝis jam siatempe, kaj ankoraŭ nun nesufiĉa: tial firmiĝis la aspekto filozofia, morala kaj preskaŭreligia de la „misio de Esperanto”. (...)

Malgraŭ tio, la informado al-ekstera estas necesa por la pluvivo de la movado. Sed jen plua kurioza afero: se mi lernas la francan, oni ne petas aŭ postulas, ke mi aliĝu al la loka grupo, kiu parolas france, aŭ ke mi kunlaboru en la disvastigo de la franca. Tion male vi „devas” fari kiel esperantistoj. La instruo de Esperanto hodiaŭ celas principe al la daŭrigo de la movado, kaj ne al la internaciigo de la lingvo. Ĝenerale, novulo deziras utiligi la lingvon, kaj ne partopreni al misiisma agado.

Ni imagu, ke ni disvastigas la bildon de Esperanto laŭ la formulo „Esperanto estas lingvo interesa, kun speciale simpatia parolantaro tra la mondo”. Sed la demando pri la disvastiĝinteco kaj pri la fakta uzo restus. Finfine, Esperanto estas flankofereto iom hobia, kaj finfine sen granda graveco. Sed ĉu tiam estas konvene lerni Esperanton?

Tre interesan verkon publikigis Sikosek en 1999. Li ekzamenis detale kelkajn bazajn mitojn de la Esperanta informado. Kaj li malkovris tre interesajn erarojn, falsigojn, misprezentojn.

Jen do grava demando! La „ne-finvenkisma skolo” neas la bazan starpunkton de Zamenhof, sed ne scias oferti ion pli valoran, almenaŭ je nivelo praktika.

Magra afero: tio klarigas, kial tro multaj novbakitoj fakte *neniam definitive bakiĝas*. Mi male opinias, ke la sola rimedo baki novan esperantiston estas serĉi, ĝis vi trovas homon, kiu „serĉis ĝuste tion”. Sed ni troviĝas ĉe la antipodoj de la universaleco, kiun revis Zamenhof. Ĉar temas ofte pri iom strangetaj homoj: cetere eĉ ne multe da ili ekzistas.

Tion pli detale menciis kaj komentis A. Künzli (*SES-informas* 2/1999), kiu tamen ankoraŭ kredas, ke ekzistas tamen finfine interesa niĉo por Esperanto. Li pravus, sed tiu niĉo estas tre malgranda, kaj direktiĝas certe ne al ĉiuj.

Pri la Esperanto-sociologio

Unu el la riskoj de la Esperanta sociologio estas la manko de reala konekto kun la observata fenomeno. Nome, ĝi riskas funkcii kiel pravigilo de la ekzisto - ĉu de la lingvo Esperanto (tra la movado), ĉu de la movado (tra la lingvo). Iusence, ĝi funkcias kvazaŭ praviga *skolastiko*, kiel raciigilo de mitoj.

Oni parolas ja ofte pri „sociologio” de Esperanto, sed fakte temas pri la sinkompreno de grupo, kiu esprimas juĝojn pri valoroj kaj pri faktoj koncernantaj sin mem. Sed ne temas pri sociologio. Temas pri ideologio. Laŭ Galor, eĉ UEA naskiĝis „raŭmisme”, sed ambaŭ sintenoj (raŭmismo kaj praelismo), rilate la movadon, estas pravaj, almenaŭ iugrade.

Silfer (1998) parolas pri grupa elekto, pri memkonsciigo, pri memkontentigo per Esperanto, kaj tiukoncerne li detale analizas la ideologion de tiu movado - aŭ almenaŭ, de la grupo, kiun li gvidas. Temas pri eseo kultur-politika, sen rilato kun sociologio.

(Sekve, la aŭtoro traktas la temon: „Empiriaj esploroj pri la Esperanto-movado” kaj priskribas la studojn de P.G. Forster (Tritio 1982), Nikola Rašić (internacia 1988), F. Stocker (Germanio 1996) kaj T. Carlevaro (Svislando 1996). La rezultoj de la enketo de Carlevaro estas resume prezentitaj en la Parto 3 de ĉi tiu enciklopedio: Esperanto: „Esperanto en Svislando”, enkonduko)

La du politikoj de Esperanto

(...)

Prestiĝo-politiko

Ĝi estas la politiko de agitado por la plivastigo de Esperanto. (...)

Ni memoru la jaron 1954: en Montevideo, UEA sukcesis akceptigi ĉe Unesko, ke Esperanto estas kulture kaj lingvo-politike interesa ilo. Kaj ke la ĝenerala sekretario de Unesko sekvos ĝian evoluon. Tio bone efikis interne de la movado, ĉar ĝi vekis grandiozan entuziasmon, sed nenion efikis ekstere.

Kiam montriĝis klare, ke la atingoj de 1954 alportis neniun ŝanĝon, oni provis novan, pli ampleksan agadon. En 1966 grandega publika subskribo-kampanjo entirkestiĝis ĉe Unesko. Oni kolektis plurajn milionojn da subskriboj. Sed la subskribo-folioj ankoraŭ ŝimas ie en Parizo. Tiu misrezulto havis tre depriman influon sur la esperantistoj, kiuj fine komprenis, ke tiu prestiĝo-politiko ne tradukiĝas al rezulto favora al Esperanto.

Esperanto havas prestiĝon ĉe la esperantistoj, sed ne spertas tion ekster la movado. Tio ne plaĉas al la Esperanto-gvidantoj. Tial ili entreprenas agadojn aŭ skribas tekstojn, ne tiom por altigi la prestiĝon aŭ la altirforton de la lingvo ekster Esperantujo, sed por *vipi* kaj *flegi* la memkonscion de la esperantistoj. Ofte ili aspektas kvazaŭ ili estus la solaj, kiuj pensas kaj projektas korekte kaj adekvate pri tiu ĉi demando. Tiu sinteno evidente incitas la aliajn kunhomojn.

Prestiĝo-politiko postulas, ke vi pagigu la kursojn de Esperanto. Sed en la realo, se vi pagigas ilin, neniu plu partoprenos. Tiu estas unu el la multaj dilemoj de la nuna situacio de la lingvo. Kiu estas speco de granda donaco farita al la homaro, kiu tamen ne scias, kion fari per ĝi.

La prestiĝo-politiko de Lapenna fiaskis, ĉar ĝi mistrafis la esencon de la problemo. Oni ne povas aĉeti aŭ inventi prestiĝon, aŭ akiri ĝin tra netaŭgaj padoj.

[La sekva alineo estas transprenita de la aldoniĝo al ĉi tiu teksto, kiu estis verkita iom post ĝi].

En la nuna malkresko de la Esperanto-movado, *Literatura Foiro*, kaj ĝiaj ĉirkaŭantaj organizaĵoj, celas haltigi la malaperon de la movadanoj, kaj per prestiĝo-politiko, kaj per servo-propono. „Esperanta Civito” estas la ĝenerala aŭ strategia kadro (la „ideologio”) de tiu politiko. Kiu espereble utilis al la malrapidigo de la hemoragio, sed ne pro tio la paciento resaniĝos. Tio demonstras, ke LF kapablas agi kaj utilitarisme, kaj prestiĝo-serĉe. Do ĝi ne estas nur kviete raŭmisma, sed ankaŭ iom UEA-eca... se entute mi ion komprenas pri tiu demando. Mi havas fortajn dubojn pri tio, ĉar mi estas „denaska” praelano.

Prestiĝa estis la agnosko de la literaturistoj verkantaj en Esperanto, fare de la Internacia PEN-organizaĵo. Kompreneble, ĝi utilis al nenio. Neniu lernos Esperanton pro tio, kaj novulo tamen tuj kaj facile perceptos, ke finfine, ankaŭ tie, daŭre renkonteblas la samaj homoj kaj la samaj nomoj. Cetere, ĉu kiel NGO-a organizaĵo, ĉu ekster la NGOoj, UEA nek gajnas nek perdas unu solan anon. Tiuj agnoskoj ne vivigas asocion. Mi opinias, ke ankaŭ eventuala atingo de Nobel-premio (al Auld, aŭ al UEA) ne multe helpas al la lingvo mem. La fakto, ke la aramea estis la lingvo, kiun hejme kaj publike parolis Jesuo Kristo, ne altigas la nunan malaltan prestiĝon de la aramea mem.

Literatura Foiro naskiĝis kiel raŭmisma entrepreno. Ĝi celas do valorigi la senton pri komuna aparteno de la esperantistoj. Por ĝin efektiviĝi, ĝi bezonas politikon, kiu antaŭvidas ankaŭ la liveradon de servoj. En formo de publikaĵoj (libroj, kasedoj, ktp), de revuoj, kaj de kursoj aŭ kulturaj manifestacioj. En kongresoj aŭ en similaj renkontiĝejoj. Oni povas diskuti pri la nivelo de tio. Oni povas diskuti pri la ĝenerala kadro, en kiu tio okazas („Esperanta civito”). Ofte en konkuro kun aliaj organizaĵoj (parte ankaŭ UEA). Sed kial ne? *Konkuro* stimulas al plibonigo kaj seriozigo de la organizado. Kaj, bonvolu: *kiun alternativon* proponas la LF-kritikantoj?

La origina celo de Esperanto ne plu aktualas. Ĝi definitive forvaporiĝis. Se iu deziras, ke la Esperanto-movado povu pluvivi ankoraŭ kelkajn jardekojn, tiu devas inventi novajn kaj alispecajn celojn. Ĉu tio valoras jes aŭ ne la penon labori? Tion devas decidi ĉiu unuopulo. Sed ĉu prave ĉu malprave, LF decidis, ke la Esperanto-movado meritas pluvivon. Kaj tion provis kaj provas fari LF. Ĉu sukcese aŭ ne, tiu estas alia demando. *A la longue*, mi opinias, ke tio ne influos la destinon de la lingvo. Sed kio alia estus farinda, aŭ farebla?

Estas fakto, ke, sociologie, la Esperanto-movado ne tiom similas al „popolo”, sed al sekto, aŭ pli bone, al ordeno. Do oni inventis kuriozaĵojn: i.a. specon de reprezenta registaro, de parlamento, de juĝa instanco. Mi opinias, ke tio ne povas funkcii, pro la esenca komplekseco de la inventaĵo, kaj pro la liberecana (iom anarkiista) karaktero de la esperantistoj. Se oni provos ĝin funkciigi, tio okazigos atombombajn konfliktojn.

Ankaŭ la „Esperanta Civito” ne reprezentas miraklan eskapejon: kun iom da bonŝanco, ĝi sukcesos nur iom malfruigi la neeviteblon.

La esperantistoj ĉiam bezonis iom da paranojo: lingvo, kiu bone fartas, ne elvokas emociojn, nostalgiojn, emon pri disvastigo, ĉar ĉio ĉi, en normala cirkonstanco, estas nebezona. Tiuj emocioj estas signo de malfacilaĵoj.

Sed ankaŭ veras, ke ĉiuj homoj devas ricevi kompenzon por sia laboro. Ekzistas monaj kompensoj, kaj prestiĝo-kompensoj. Monaj kompensoj, por homoj laborantaj en la Esperanto-movado, estas tre malmultaj. Eble ili eĉ ne ekzistas. Prestiĝo-kompensoj povas ja veni, sed *ne* de la ekstero. *Neniu* priatentas la baraktojn de nia ŝrumpanta movado. Ili povas veni nur el la interno de la movado mem. En formo de iom pompaj funkcio-nomoj.

En mortanta movado, *estas normale ke oni kverelu*. Neniu akceptas sian propran respondecon pri la misinvesto. Neniu scias plu kion fari: tial, se aperas iu kun nova ideo, ĉu oni aliĝas al li sen kritiko, esperante pri magia solvo, ĉu oni energie kontraŭbatalas lin, por almenaŭ iomete montri al si mem, ke oni restas aktiva. Nekredebla estas la listo de harfendaj disputoj, kiuj fine fariĝis eĉ interhomaj kvereloj, pri fakte nenio – aŭ malmulto. Rememoru nur la akrajn diskutojn pri -ata/-ita, pri kiom/kiel, pri -ujo/-io, pri estis/estas estinta, pri la neologismoj, pri la skribmaniero (æ, cx, ch). Kvazaŭ la honoro de la individuoj, kaj la pluvivo de Esperanto dependus de tiaj detaletoj. Sed ja, ekzistas nenio pli grava por fari, ol tio.

Kiam ŝipo sinke dronas, ĝin forlasas unue la ratoj. La homoj kondutas aliel: komenciĝas milito de ĉiu kontraŭ ĉiu. La rezulto de tiu sinteno estas priplorinda. Nur ordo, konkordo, kunlaboro, permesas, ke en tiuj cirkonstancoj saviĝu pli multe da homoj. Gala sinteno, mistrafa atako al la homoj (kaj ne nur al la ideoj) akcelas pereon. Ankaŭ en Esperantujo.

Tion rimarkas bone *ne nur* la novuloj, kiuj ĝuste ankaŭ pro tio rapide forlasas Esperanton, ĉar ili timas tiajn nenienkondukajn kverelojn, *sed ankaŭ* la eksteruloj, kiuj nur interesiĝas pri la fenomeno „Esperanto”.

[Sekvas klarigoj pri la konceptoj de la t.n. „finvenkismo” kaj de la „raŭmismo” kaj pri la uzo de lingvo en scienco. Eo en scienco estus lingvo interesa, se en ĝi aperus inter 30 kaj 50%-oj de la sciencaj verkoj. Nur per tio lingvo fariĝas utila, kaj tial lerninda.]

La naskiĝo de komuna lingvo en Eŭropo
La influo de la angla

La angla ĉiam estis tre grava lingvo, sed, ĝis la dua mondomilito, ĝi estis hegemonia nur en la cetero amplekseĝaj partoj de la mondo, kiuj troviĝis sub la usona, kaj aparte sub la angla regado. Speciale Usono estis cetero granda kaj riĉa lando. La granda kresko de la angla, kaj ĝia atingo de ĉiam pli granda ne-denaska parolantaro, kaj ĝia disvastiĝo hegemonia al landoj kaj terpecoj, kie ĝi pli frue estis nur sporade aŭdebla, estas fenomeno relative recenta. [tiel!]

Fine de la pasinta jarcento, gravis en Eŭropo, kaj en la tuta okcidenta mondo, tri lingvoj: la *franca*, la

angla kaj la *germana*. Zamenhof celis peri inter tiuj tri grandaj lingvoj, pere de kroma, internacia kaj „neŭtrala” lingvo.

La maltrafo de Esperanto bone korespondas, tempe, je la fiasko de la du ceteraj lingvoj de Eŭropo, kies rolo fariĝas ĉiutage pli regiona. Sed finfine, kun la escepto de la franca, nur Esperanto havis pretendojn al tutmondiĝo - kaj eĉ ankoraŭ kelkajn tiajn havas. Plej granda parto de la neŝtata kaj ne eŭrop-unia komunikado en Eŭropo okazas en la angla. Praktike nenio grava okazas pere de Esperanto.

Ankaŭ la disvastiĝo de la franca lingvo suferis pro tiu fakto. Ĝi estas instruata kiel unua fremdlingvo nur en la landoj de la francparolanta Komuno (*Communauté francophone*), kie, cetere, kiel duan lingvon, oni ĉie instruas ankaŭ la anglan. En la resto de la mondo, la franca malaperis. Nur en kelkaj landoj, ĝi restis kiel dua- aŭ tria-momente lernata fremdlingvo. Do, fakte, nesciata.

Mi ne scias, ĉu la anglan antaŭenpuŝas reakciuloj kaj imperiistoj. Povas eĉ esti, ke jes. Certas, ke postulas kaj antaŭenpuŝas la anglan jenaj fortoj:

- Ĝenerale, ni rimarkas la *popolan volon*. La eŭropaj gepatroj postulas, ke iliaj infanoj, en la lernejoj, lernu la anglan kiel unuan fremdlingvon.

- La *lingvomerkato*, kiu liberiĝis post la falo de la Berlina muro, puŝas al la disvastiĝo de tiu komunikpova lingvo.

- La *scienca evoluo kaj la influo de la tekniko* puŝas al la uzo de unueca lingvo. Se vi volas partopreni en la scienca vivo, vi nepre devas bone scii la anglan (parole kaj skribe, ne nur lege kaj aŭde).

- La *ekonomio*, kiu liberiĝis ekde 1989 mondnivele, liberigis ankaŭ la „lingvajn valorojn”. La angla estas la fakta interlingvo en la kampo ekonomia. (...)

- La altiro de *American way of life* (t.e. la kultura influo) estas puŝa forto favora al la angla. (...)

La Berlina „muro”, kaj entute la politika divido interne de Eŭropo, helpis Esperanton, ĉar ĝi kreis la iluzion, ke, malantaŭ la muro, la lingvo estas estimata kaj aplikata: eble eĉ estis iom tiel. La ekzisto de divido ŝajnis esti barilo al la angla: „preter la muro“ oni ne deziris havi usonecan interlingvon. Bedaŭrinde, la uzo de Esperanto fariĝis parto de tiu forgesenda periodo, kaj tial la lingvo malaperis kiel neĝo je l’suno. Anstataŭe, la angla penetris novajn teritoriojn, kie la homoj atendis ĝuste nur ĝin.

La esperantistoj asertas, ke tiu lingva mond-ordo fakte estas *maljusta* kaj *malpraktika*. La normalaj civitanoj, male, ne konsentas, ke temas pri maljusteco. Cetere, la nuna komunika mond-sistemo ne estas malpraktika. La angla funkcias bone: ĝi estas efika, pova, kaj ĝi „kostas” malpli, ol se oni volus enkonduki Esperanton kiel novaĵon. Ĉar por ĉi-lastata ekzistas nur ĉu malnova, ĉu nesufiĉa instru-materialo (mi aludas al instruistoj kaj al lernolibroj).

Ne ekzistas, do, demando pri „lingva imperiismo” kaj pri „lingvomortigo” (Yamasaki 1999), almenaŭ kiel fenomeno ĝenerala. Nur la esperantistoj kredas, ke tiuj temoj estas gravaj. (...)

Ofte mi demandas min, kiu estas etnocentra. Ĉu vere nur la Usonanoj, aŭ ĉu ankaŭ niaj eŭropaj esperantistoj? En Usono ekzistas etnocentrismo, kaj kompreneble ankaŭ senkultureco, sed ne pli ol en Francio kaj en Italio. Abundas, male, altkvalitaj lernejoj, kaj la kapablo utiligi kreive sciencan. Tion la Eŭropanoj rajtas envii tute prave.

Multo el la Esperanto-mondo efektiviĝas: internacia lingvo, internacia kulturo, monda komunikado, interŝanĝo de homoj, frua instruado de lingvoj, justeco, tolero, internacia humanismo, ktp. Nur la lingvo komplete forvaporigiĝis. Nome, Esperanto ne plu apartenas, serioze, al la „konkuro”.

Sen Esperanto funkcias *Amnesty International, Médecins sans frontières, Terre des Hommes, Caritas International, World Wildlife Found*, kaj eĉ IPA (*Internacia Polica Asocio*: fondita de W. Marich) kaj ILF (*Internacia Framasona Ligo*). Kurioza afero: la du solaj internaciaj fakasocioj fonditaj de esperantistoj per Esperanto, kiuj sukcesis, nuntempe ankoraŭ funkcias nur dank al la angla! Kompreneble mi ne aludas ĉi tie al la interŝtataj organizaĵoj, kiel UNO, Unesko, EU, ktp., kiuj ankaŭ funkcias ĉefe tra la angla.

Montriĝis, ke la homoj ne interesiĝas pri la jenaj aspektoj, kiuj aperas esencaj al la esperantistoj. Ili volas rezultojn, tuj, kaj, por ilin havi, ili kapablas akcepti kelkajn malagrablajn. Cetere, *le mieux est l'ennemi du bien*. Ni asertis, ke neniu plu pledas kontraŭ lingva imperiismo aŭ kontraŭ io tia, almenaŭ rilate la anglan; se entute, temas pri subjektiva sento. Ofte argumentoj, kiuj al ni ŝajnas plej trafaj, fakte ne efikas ĉe ekster-esperantujanoj, ĉar ili ne suĉis nian saman ideologian lakton.

- *Facileco / malfacileco* de lingvo estas konceptoj relativaj. Ekzistas multaj malfacilaj lingvoj (t.e. lingvoj malregulaj, aŭ kun aparte komplika gramatiko aŭ fonologio).

- Ĉiu lingvo estas enlerneje *propedeŭtika*.

Pli bonas *konata* kaj *pova* situacio, ol pli bona, sed ne elprovita. Esperanto povas aspekti kvazaŭ danĝera veto, ĉar ĝi estas ĝenerale nekonata, kaj tute certe senpova, en la nuna situacio. (...)

La nuna penetro de la angla en Eŭropo (kaj multe pli en Afriko kaj Azio) estas io speciala. Ĝi estas multe pli intensa ol la iama penetro de la franca en Eŭropo. Ĉar la francan parolis nur kleruloj, kaj la francan adoptis plene nur rusaj nobeloj. En tuta Eŭropo nombre superis la sciencaj ĵurnaloj publikigataj en Francio, sed, en la diversaj landoj, oni eldonis propralingvajn periodaĵojn. *Nun ne plu*: la sciencaj periodaĵoj aperas *ĉiulande* grandparte en la angla. La angla penetris ĉiun momenton de la vivo de ĉiuj. Iusence, la nuna situacio lingve similas al la alveno de la latina en la keltaj landoj. Ĝi estas, fakte, movado amasa, kaj ne elita, kiu tuŝas ĉiujn aĝojn, kaj moviĝas en la amaskomunikiloj.

Interesa fenomeno estas la jena: post malmultaj jaroj, la anglan parolos pli da nedenskanoj, ol da denaskaj anglalingvanoj. La angla do fariĝos tiam la plej disvastiĝinta ponto-lingvo, kun ankaŭ propra ampleksa denaska parolantaro. Jam nun aperas ĉiam pli ofte verkistoj en Hindio, en Pakistano, en Afriko, kiuj verkas angle, kvankam ili ne estas origine anglalingvaj. Komence, tiu fenomeno estis sporada (i.a. Josef Conrad). Nun, unu el tiuj verkistoj (Soyinka) atingis la Nobelpremion pri literaturo.

La iompostioma kresko de la uzo de la angla en specialaj medioj, en avangardaj fakoj, efikis kiel lavango. Iom post iom oni atingis la *kritikan mason*, preter kiu la angligo de la scienca komuniko en niaj landoj okazas de si mem, per propra forto, kaj iĝas nehaltigebla.

Unu el la dogmoj de la lingvo-instruistoj kaj de la esperantistoj baraktas kaj ŝancelas. „Ni instru al la infanoj la lingvojn de la najbaroj, kaj unu komunan lingvon al ĉiu”. Nuntempe, en multaj lernejoj oni rifuzas lerni la lingvon de la najbaroj: kial Nordgermanoj devus lerni la danan? La dana estas utila nur por paroli kun la Danoj. Prefere oni instru la anglan, per kiu oni povas paroli kun la tuta mondo, inkluzive de la Danoj (kiuj, cetere, tre bone scias la anglan).

Alia dogmo (tipe esperantista) tremas: „Se ni ĉiuj lernos la anglan, la anglalingvanoj ne plu bezonos lerni fremdan lingvon, kaj tio kreus malagrablan avantaĝon al ili“. Ankaŭ mi estas konvinkita, ke la premo al la lernado de fremda lingvo, en anglalingvaj landoj, ege malintensiĝos. (...)

La angla jam estas la lingvo de la inter-urba reto. Ĝi do fariĝas, iom post iom, ankaŭ la lingvo de la urboj mem, aŭ, prefere, de tiu virtuala urbo, kiu konstruiĝas ĉirkaŭ la cirkulado de la informoj.

En Zuriko, same kiel en Ĝenevo, Parizo, Romo, Vieno, ktp., ankaŭ eblas vivi sen scio de la loka lingvo, kaj nur pere de la angla. Integriĝo, tiam, ne estas celo, kaj cetere la prestiĝo de la angla ne puŝas onin al lingvo-ŝanĝo. Dum la ekskluziva uzo de la itala indikas malaltan socian nivelon, la ekskluziva uzo de la angla indikas tre altan nivelon. Sed, kompreneble, tio indikas ankaŭ tendencon, emon kaj modon. (...)

Tio ne signifas, ke en la ‘moderna’ mondo oni parolos nur la anglan. La malapero de niaj lingvoj (itala, franca, germana ktp.) ne okazos baldaŭ. Certe ne en 2045! (...)

[La sekva ĉapitro estas dediĉita al la „lingva politiko en Svislando”. La aŭtoro montras la progreson de la angla lingvo kiel „lingua franca” en Svislando, ĉar ĝi ĝuas altanprestiĝon en tiu lando.]

Kial Esperanto fariĝis neutila

Esperanto fariĝis neutila en la monda praktiko, ĉar ĝia komunika potencialo estas preskaŭ nula (de Swaan 1998). Fakte, neniuj malhelpas, ke oni utiligu Esperanton. La lingvo - ĉiu lingvo - estas kolektiva bieno. Iusence, Esperanto estas ja ‘natura lingvo’, kaj la naturaj lingvoj estas alireblaj al ĉiuj. Lingvo povas principe kontentigi ĉiun ajn komunikbezoon. Se lingvo vivas, aŭ se ĝi mortas, tio ne estas lingvistika demando, sed nur *sociologia*.

Mi aliĝis al la Esperanto-movado en epoko, kiam ĝi estis speco de funkcia internacia lingvo por blinduloj. Multaj blindulaj bibliotekoj ŝatis ricevi brajlajn tekstojn en Esperanto, kaj pli poste ili ŝatis ricevi kasedojn en Esperanto. Nun tiu aparta rolo ne plu ekzistas (Grassini 1999). Naskiĝis lego-maŝinoj, kaj programoj, kiuj rekte ĉu skribas parolataĵon, kvazaŭ sekretariino, aŭ legas elektronike skribitajn tekstojn. Ekzistas interesaj instru-teknikoj por efike instrui fremdajn lingvojn ankŭ al la blinduloj. Kaj, kompreneble,

ĉio tio malgrandigas la intereson por Esperanto.

Tiu estas nur unu el la multaj malprogresoj de la lingvo. Esperanton oni ne uzas, ĉar *ĝia komunika potencialo* estas malalta. La komunika potencialo ne konsistas nur el la fakta uzo de lingvo, sed ankaŭ el la impreso, ke ĝi estas pli pova kaj pli prestiĝa. Nome, en Eŭropo, la germana estas pli parolata ol la angla, sed la angla restas la preferata komuniko-lingvo. La ĉina estas la plej parolata lingvo en la mondo, sed ĝi estas relative 'malgrava'. La araba disvastiĝis pro religiaj kaŭzoj ĉefe en la sudaj bordoj de la ĉirkaŭmediteraneaj landoj, sed temas pri landoj malriĉaj, sen influo eksterlanda. Ĉiuj kleraj arablingvuloj konas al anglan.

Esperanto ne fariĝis vaste uzata komunikilo, sed nur la komunikilo disvastiĝinta en la esperantistaj diskut-kluboĵoj. En ili oni diskutas, cetere, ĉefe pri esperantaĵoj. Kaj ĝi bedaŭrinde restis kaj ankoraŭ nun restas en tiuj kluboj. Tiu situacio estas vera senelirejo.

La uzo de lingvo, cetere, ne dependas de ĝiaj kvalitoj. Ne la plej taŭga lingvo „venkos” (t.e. tutmondiĝos), sed tiu, kiu montriĝas plej ofta en la modernaj komunikadsistemoj. Ni konsideru la videobendajn sistemojn. VHS fariĝis universala, kvankam Beta-sistemo, Video-2000, kaj ĉefe Video-8 estas teknike multe pli altkvalitaj ol VHS mem. VHS certe malgajnos estonte, sed favore al DVD-sistemo. Pri Beta-sistemo neniu plu parolos.

Iusence, la esperantistoj estis ofte speco de *salo* en la internacia vivo. Sed neniu malkovris tion. Neniu sekvis tion. Grandparte sendepende, la ekstera mondo remalkovris ĉion, kion la esperantistoj elpensis. Iusence, oni ĉion *akceptis*, el la esperantista mondo, kun la escepto de la lingvo:

- Aktiva instruado en la lernejo fariĝis delonge bazo de la lingva instruado. Ĉe-instruado (ne sub la nomo de Andreo Ĉe) delonge estas normala tekniko utiligata.

- La esperantistoj ĉiam asertis, ke indas instrui lingvojn al infanoj. Nuntempe temas pri afero vaste akceptata.

- La esperantistoj neniam timis dulingvecon. Ĉiu hodiaŭa specialisto pri edukado opinias same.

- La esperantistoj ĉiam favore parolis pri komuna lingvo por la tutmonda komunikado. La apero de la angla en tiu situacio atentigis la homojn pri la avantaĝo de tiu monda lingvo.

- La esperantistoj ĉiam opiniis, ke lingvo instruata devas utili al la bazaj bezonoj de la homo. Tial, indas instrui fundamentan sed utilan vortaron ('minimuma lernado'). Tiu principo fariĝis universala.

- La esperantistoj ĉiam subtenis la praktikan uzon de lernota lingvo. Nuntempe oni ne plu lernas nur por legi beletron!

- Ne gravas, ĉu iu parolas bele, ĉu iu parolas iom erare. Ni invitu la homojn, utiligi lingvon sen timo, kaj tial ni malatentu al la lingvaj eraroj. Tiu sinteno fariĝis grava en la moderna pedagogio.

- La esperantistoj ĉiam subtenis, ke oni malakceptu la lingvan diskriminacion. La nuna disvastiĝo de

la angla permesas egalnivelan partoprenon al la tutmonda scienco kaj kulturo eĉ al simplaj homoj.

- La lingvoplanado estis esenca punkto ĉe la esperantistoj. Neniu kontraŭas plu tiun tezon.
- Sed akompanas tion ankaŭ lingvopolitiko: ĝi estas grava momento en la ŝtata kaj kultura politiko.

Konkludo

Esperanto ne plu ekzistas en la konscio de la svisoj. Nek kiel io reala, nek kiel io ebla. Ne en turismo, ne en diplomatio, ne en scienco, ne en amuzado, ne en lerno, ne en profesio, ne en komerco. Ĝi estas nevidebla kaj neidata: ne en libroj, ne en revuoj, ne en librovendejoj, ne en filmoj. Ĝi havas lokon en neniuj projektoj de socio, en neniuj vizioj de la estonto. Kaj tamen, la publika ĉeesto de la lingvo estas necesa, por ke estu garantio pri supervivo.

Sen prestiĝo, sen perspektivo, kun limigita interna apliko (al amuza kaj turisma babilado), kun internaj kvereloj, kiuj klare indikas pri stagno, ĉar movado, kiu kreskas, ne montras kverelojn. Konsentite, kvereloj montras vivon, kaj, kiel asertis Privat en 1912, ili ne estas sangaj.

Finfine, la iama 'internacia', aŭ eĉ 'universala' lingvo transformiĝis al unu plia lingvo. Jen la situacio. Esperanto transformiĝis al 'lingvo speciala', de aparta grupo, kiu flegas ĝin kun forta lojaleco. Ironie, la esperantistoj kontribuis al la plimultigo de Babelo, ne al ĝia solvo. Ĉar la solvo venis, sed de alia flanko.

Kelkaj opinias, ke kulpas la esperantistoj, ĉar ili ne kapablis sufiĉe disvastigi sian lingvon. Kelkaj opinias, ke kulpas la ne-esperantistoj, ĉar ili ne sukcesis kompreni la racian idealon de la esperantistoj.

Por tion klarigi, kelkaj opinias, ke kontraŭ Esperanto rolas ankaŭ kelkaj psikaj mekanismoj, kiuj malhelpas racian pensadon, rilate la internaciigon de planita lingvo. Mi povas konsenti, kun Piron (1994), ke la kontraŭstaro al Esperanto venas, almenaŭ parte, de psikaj defendo-mekanismoj kontraŭ neraciaj angoroj. Mi konsentas kun li, cetere, ke en la Esperanta movado ekzistas ankaŭ fortaj karakteroj, kaj ne nur neŭrozaj personoj. Povas esti, ke Esperanto, iusence, estas sentata kiel tre forta tabuo, misefike ĉe la ekstera publiko. Sed tio signifas, ke kontraŭ la ideo de planlingvo ekzistas stranga kaj antikva malemo. Tiu malemo estas origina, praa. Sed tiam, kial diable insisti por doni planlingvon al iu, kiu ne volas ĝin?

Supozeble la esperantistoj eraris. Ili kredis, ke la publiko ŝatos Davidon. Sed okazis, ke ĝuste Goliato fariĝis populara, dum Davido tute ne. Por nia konscio, estas klare, ke tio estas tre bedaŭrinda, kaj mi estas konvinkita, ke la fakto, ke la esperantista propono estis rifuzita, ne signifas, ke ĝi estis principe senvalora. Montrigis, ke la juĝo-kriterioj de niaj ceteraj kunhomoj estis esence aliaj ol ni imagis.

Ĉu Esperanto atingos la jaron 2045?

Esperanto montris grandan kresko-forton inter 1910 kaj 1930, ĝis montriĝis, ke ĝi ne atingos siajn celojn. Ni devas agnoski malvenkon. Ne Esperanto akceptiĝis kiel internacia lingvo, sed la angla. La Esperanto-movado naskiĝis por vivi la lingvon. Ĝi daŭris, ĉar kelkaj lernintoj ne intencis rezigni je la faritaj grandaj hom-, temp- kaj mon-investoj.

Malgajnis ‘pracelismo’, kaj gajnis ‘raŭmismo’. Unu plia lingvo. Sed temas pri iluzia venko, kiu nur anticipas rapidan kaj radikalan malkreskon.

Mankis sistema politiko de Esperanto, kvankam multaj tiaj politikoj estis elprovitaj. Ni devas konstati, ke Eŭropo (kaj la mondo) ne volas artefaritan lingvon. Ne povas ekzisti vera politiko de Esperanto. Ne idealoj antaŭenpuŝas la mondon, sed la interesoj kaj la profitoj.

Ne videblas estonto por la planlingvoj. Ili *malaperos*. En la jaro 2010 malaperos la Ido-movado. En 2020 estos la momento de Interlingua. En 2045, supozeble, estos la fino de la Esperanto-movado, kiu transformiĝos al movadeto grupiganta kelkajn maljunulojn, kiuj fakte ne povas akcepti, ke io ne funkciis en la tuta demando. En 2100 Esperanto estos muzeaĵo.

Esperanto, la revuo de UEA, jam anoncas ion tre danĝeran: la nombro de la membraro de UEA stagnas ekde 10 jaroj, sed la konsisto de tiu membraro aliiĝas: kreskas la procentaĵo de la UEA-anoj en la evolulandoj, kaj malkreskas la okcidentanoj. Tiu estas ne nur katastrofo ekonomia, sed ankaŭ evolua: ĉar la kerno de la moderna estas la okcidento („Al libera merkato de UEA”, en *Esperanto*, 4/1999).

Ankaŭ verko pri la historio de la franca Esperanto-movado konkludas iom malĝojige: „Ŝajnas, ke ni ne bone komprenis la evoluon de la socio, kaj ne sciis adapti nin sufiĉe por daŭre ludi gravan rolon en ĝi. Emfazo de la abstrakta, teoria valoro de la lingvo ne plu sufiĉas. Revo de *triumfanta Esperanto* eksmodiĝis. Esperanto en si mem ne plu estas entuziasmiga allogilo: ĝian praktikan utiligon, ĝiajn sentebajn avantaĝojn ni devas proponi. Post Boirac, ni ĉiam asertis, ke ‘Esperanto estas la latino de la demokratio’, sed kion konkretan ni vere proponis al la popolo?” (Hervé Gonin, 1998).

Estas bedaŭrinde por la lingvo, kiu fakte estas interesa kaj eĉ genia kreaĵo. Certe, la ortografio de Esperanto estas io tre ĝena, sed certe ne estis tio, kio malhelpis. Eĉ sen supersignoj, ĝi ne havintus pli bonan akcepton. Ido ne havas supersignojn, kaj tamen ĝi troviĝas en agonia stato.

Kulpas ne la esperantistoj, kiel kelkaj asertas. Ili kuraĝe kaj sindone batalis, oferis, proponis kaj deziris. Ili estis ekzemplaj, en sia sindediĉo. Ne: kulpas la politikaj decidoj faritaj en 1922 ĉe la Ligo de la Nacioj. Kulpas la blindeco de la tiamaj kaj postaj politikistoj francaj kaj germanaj. Sed eble, eĉ se ili estus konsentintaj kun la solvo „Esperanto”, la decido estintus, tamen, finfine, neaplikebla. Eble la esperantistoj ne taŭge taksis, ke planlingvo devas esti jam komence utila. Idealismo ne sufiĉas. Ankaŭ ne helpis la ĝenerala promeso, ke tiu lingvo faciligos la lernon de pluaj lingvoj.

Etiko ne helpas. La lingvo devas esti *palpeble utila* al la vivo de la lernintoj. Eble ili trogravigis demandojn fakte ne multe sentatajn ĉe la publiko. Ĉar la plej granda parto de la homoj fajfas pri lingva

egaleco, kaj fajfas pri la morto de minoritataj lingvoj. La homoj ĝenerale nenion rimarkas, aŭ tre malmulton, aŭ mem partoprenas al la mortigo de sia propra lingvo. Sed ploras pri la morto de la lingvo de la aliaj. La esperantistoj mistaksis ankaŭ la rolon de la racio kaj de la 'perfekteco' en tiuj demandoj. Ne altkvalita lingvo estas utiligata, sed lingvo komunike pova, ĉar uzata ĉie.

Nia tasko, nuntempe konsistas en la konservo de la memoro pri Esperanto: kiel lingvo, kiel movado, kiel kulturo, kiel literaturo. Ni ne povis esti la kavaliroj de la efektivigita idealo zamenhofa. Ni estu, malgraŭ ĉio, minimume, la administrantoj de la memoro.

[Aldonita estas longa fakbibliografio de konsiderataj verkoj en ĉi tiu studo.]